



JARA RAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2013–2014

Enhavo:

1. Konsciigo

- 1.1. Preleg-vojaĝoj
- 1.2. Gazetara komunikado
- 1.3. Le Monde de l'espéranto (LME)
- 1.4. Esperanto-Aktiv
- 1.5. Expolangues

2. Kapabligo

- 2.1. Instruado
- 2.2. Ekzamenoj
- 2.3. Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno
- 2.4. Afrika solidareco

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Universala Kongreso de 2015 en Lillo

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Rilatoj kun SAT-Amikaro
- 4.3. Statuto kaj interna regularo
- 4.4. Komitato kaj membraro
- 4.5. Financoj

5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

Enkonduko

Ĉi jare denove ni proponas al vi nian Jaran Raporton, prezentitan kaj ordigitan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K : Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala Asembleo okazonta en Parizo la 18an de aprilo aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la Jara Raporto: Michèle Abada-Simon, Monique Arnaud, Sylvain Barrier, Susanna Beglaryan, Katja Boen, Pierre Bouvier, Jeanne-marie Cash, Michel Dechy, Xavier Dewidehem, Josette Ducloyer, Bruno Henry, Christian Lavarenne, Didier Loison, Edmond Ludwig, Flora Markov, Yves Nicolas, Claude Nourmont, Eugene Papciak, Philippe Pellicier, Marion Quenut, Martine Ragonnet, Axel Rousseau, Bert Schumann, Quentin Weber-Saban,

Apartan dankon al Raymonde Coquisart kaj Aleks Kadar, kiuj multe laboris por ĝi, kaj al niaj kasistoj, Anne-Émilie Ravache kaj Sébastien Montagne, kiuj baraktadis pri la financa raporto. Dankon al la kontrolleginto kaj enpaĝiginto, t.e. Emmanuelle Richard.

Agrablan legadon deziras al vi
la estraro de Espéranto France

1. Konsciigo

1.1. Preleg-vojaĝoj

Prelegvojaĝoj dum la periodo oktobro 2013 – decembro 2014

Novembro 2013

Zhang Ping (Ĝoja) prelegvojaĝis de la 16a de novembro ĝis la 1a de decembro. Estis la kvina kaj lasta turneo en 2013. Tiu ĵurnalisto de Ĉina Radio Internacia allogis 28 klubojn kiuj kandidatis por ŝin akcepti sed ni povis elekti nur 7 klubojn ĉar la restado estis tro mallonga por kontentigi ĉiujn. 450 homoj (inter ili 200 lernantoj aŭ studentoj) estis tre interesataj pri la nuna vivo en Ĉinio, diversaj temoj, kiujn lerte kaj dokumente pritraktis Ĝoja.

2014

Okazis 6 turneoj. Nome :

- Svetlana kaj [Firdaŭs Ŝukurov](#) el Taĝikio,
- [Miguel Angel Gonzalez Alfonso](#) el Kubo,
- [Mikaelo Lineckij](#) el Ukrainio,
- Shin Eun-Sook ([Ana Songanta](#)) el Koreo,
- [Peng Zhengming](#) el Ĉinio,
- [Stano Marček](#), el Slovakio.

La turneoj daŭris de 10 ĝis 90 tagoj. La plej kurta estis tiu de Ana Songanta kaj la plej longa de Miguel Angel, kiu ne nur prelegis en Francio sed ankaŭ intervenis kadre de la IFEF kongreso en Italio.

La prelegantoj havis tre altan nivelon kaj proponis interesajn prelegojn. Firdaŭs Ŝukurov estas unu el la motoroj de la taĝika movado, Miguel Angel tre lerte, sincere, detale respondis al multaj demandoj pri Kubo, Mikaelo alportis siajn proprajn fotojn pri la eventoj de Kiev, Ana, kun entuziasmo kaj konvinkoforto, prezentis instruon de Esperanto en koreaj alternativaj lernejoj, Peng provizis nin per interesaj flankoj de la nuna vivo en Ĉinio kaj Stano Marček, eks-redaktoro de la revuo *Esperanto* kaj aŭtoro de tre fama rekta metodo, forte influis ankaŭ la ne-esperantistan publikon.

Ni kalkulis, ke proksimume 1200 homoj ĉeestis tiujn konferencojn, kiuj kelkfoje okazis en lernejoj. El ili proksimume, 300 ne havis rektan aŭ malrektan rilaton kun esperanto. Bedaŭrinde, ĝenerale aperis malmulte da raportoj en la

gazetaro. La demando estas ĉu la ĵurnalistoj priafas nian aferon aŭ ĉu la kluboj devus iom pli pripensi reklamon kaj rilatojn kun la gazetaro ?

32 kluboj (el Francio kaj Belgio) kaj Kvinpetalo, SAT-Amikara sidejo akceptis la prelegantojn.

Plej multaj akceptis unu preleganton : Saint-Malo, Vannes, Dijon, Bruselo, Antverpeno, Gérardmer, Gironde, Rennes, Périgueux, Limousin, Strasbourg, Saint-Nazaire, Le Havre, Saint-Brieuc, Ariège, Dinan, La Roche-sur-Yon.

Du : Le Mans, Angers, La Ciotat, Tours, Amiens, Lyon, Bourg-en-Bresse, Thionville, Bourges, Toulouse, Lille.

Tri : Châteauroux.

Kvar : Clermont-Ferrand, Paris (sidejo de EF)

Ses : Hérouville-Saint-Clair (kiu festis la tridekjariĝon de sia klubo kaj inaŭguris Skvaron *Esperanto*).

Ĉiuj informoj pri la prelegturneoj legeblas (franclingve) en la retejo de Esperanto-France :

<http://esperanto-france.org/conferences>

Raportas Yves Nicolas

1.2. Gazetara Komunikado

La Gazetara Komunikado kreskegis kompare al la pasinta agadperiodo: dum la agadjaro 2013-2014 estis dissenditaj 15 komunikoj, kontraŭ 6 dum la periodo 2012-2013. Vidu sube liston de tiuj komunikoj kaj kelkaj el iliaj rezultoj.

Listo de gazetaraj komunikoj dum la periodo 2013-2014 : <http://esperanto-france.org/communiqués-de-presse-2014>

Listigo (Esperanto-tradukoj de la franclingvaj titoloj) :

Dato	Titolo	Ligilo
15an de decembro 2014	Zamenhof-tago festita de la tutmondaj esperantoparolantoj	Ligilo
14an de oktobro 2014	Lille 2015 : preparado de la 100a UK	Ligilo
25an de septembro 2014	Ĉio pri la lingvoj! (pri lingvo.info)	Ligilo
23an de septembro 2014	Esperanto ĉeestas dum la europa tago de la lingvoj	Ligilo
21an de julio 2014	Tutmonda aktualaĵo en Sudameriko dum la tuta julio monato	Ligilo
11an de julio 2014	Argentino venkos la piedpilkan mondpokalon!	Ligilo
26an de majo 2014	Landa kongreso de Esperanto 2014 en la urbo Chambéry	Ligilo
17an de majo 2014	Tutmonda sesio de Esperanto-ekzamenoj samtempa en 19 urboj el 19 landoj	Ligilo
16an de aprilo 2014	Chambéry: projekcio kaj debato pri Esperanto	Ligilo
12an de aprilo 2014	Lille 2015: preparado de la 100a UK	Ligilo
23an de marto 2014	Kreskiĝo de Esperanto en Afriko, prelego de Mireille Grosjean en Parizo	Ligilo
21an de marto 2014	Transdono al la ministrejo pri nacia edukado na la petskribo favora al aldono de Esperanto en la abituraj opcioj	Ligilo
21an de februaro 2014	Internacia tago pri la gepatra lingvo	Ligilo
5an de februaro 2014	Expolangues 2014 , Esperanto estas la plej facila el la lingvoj	Ligilo
21an de januaro 2014	La Europa Komisiono lingve diskriminacias la junularojn organizojn	Ligilo
25an de novembro 2013	Gazetara konferenco de Zhang Ping (Ĝoja), ĵurnalistino ĉe Ĉina Radio Internacia	Ligilo

23an de oktobro 2013	<i>Gravity, Esperanto Filmoj</i> kaj la filmoj en Esperanto	Ligilo
----------------------	---	------------------------

Vidu la plenan liston de artikoloj aperintaj en 2014 en landaj, regionaj kaj lokaj gazetoj en la retejo de Espéranto-France : <http://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2014>

Radio-elsendoj

Jen kelkaj radiaj elsendoj okazintaj en 2014:

Dato	Radio	Enhavo	Ligilo
Ĉiun merkredon	CFM	Elsendo far andré Andrieu okazas merkrede je la 21a kaj reauskulteblas dimanĉe je la 12a.	Ligilo
6an de junio 2014	Radio Laser	Malkovri kaj praktiki Esperanton en la urbo Rennes!	Ligilo
15an de majo 2014	Europe 1	En la elsendo de fama humoristo, lia teamo malkovras Esperanton, kun telefona partopreno de EDE-kandidato, Laure Patas d'Illiers.	Ligilo
12an de aprilo 2014	Radio Alpine Meilleure	Monique Arnaud, EDE-kandidato, intervjuita dum tuta elsendo "donita voĉo al".	Ligilo
23an de januaro 2014	Radio Alpine Meilleure	Monique Arnaud, esperantisto, intervjuita dum tuta elsendo "itinerio".	Ligilo

Pli da detaloj troviĝas ĉe: <http://esperanto-france.org/emissions-radio>

Televid-elsendoj

Jen kelkaj televidaj elsendoj okazintaj en 2014:

Dato	Televido	Enhavo	Ligilo
29an de majo 2014	France 3 Alpes	Reporteraĵo pri la landa kongreso kaj intervjuo kun la prezidanto de Espéranto-France, Axel Rousseau.	Ligilo
20an de majo 2014	France 2	Reporteraĵo pri Esperanto-kurso gvidata de Cyrille Hurstel.	Ligilo
20an de majo 2014	BDM TV	Intervjuo kun Laure Patas d'Illiers, EDE kandidato.	Ligilo
21an de feb. 2014	Canal 32	Reporteraĵo sur loka kanalo pri la departementa asocio.	Ligilo

Pli da detaloj troviĝas ĉe: <http://esperanto-france.org/reportages-television>

Sociaj retoj

Aldonindas, ke ekde januaro 2014, estis, preskaŭ ĉiutage, dissenditaj centoj da komuniketoj al la grupoj de Espéranto-France en :

- [Google Plus](#) (39 abonantoj)
- [Vizaĝlibro](#) (Fejsbuko) (940 anoj je 17a de marto 2015)

- [Twitter](#) (302 abonantoj je sama dato)

La mesaĝoj temas pri aktualizaĵoj de la asocio en Parizo, en Francio, en la mondo, laŭ la ricevitaĵoj informoj. Se vi deziras, ke ni dissendu mesaĝon al tiuj grupoj, bv. skribi al presse@esperanto-france.org

1.3. Le Monde de l'espéranto

Aperis tri numeroj (586, 587, 588) dum la koncerna periodo. Aperis duobla numero 589/590 en decembro 2014.

Ĝi estas redaktita de Claude Nourmont, la grafikan laboron prizorgas Bruno Flochon. Regule kunlaboris por la paĝoj Actualités en la franca aŭ/kaj por la kulturaj paĝoj Bernard Behra, Jean-Pierre Boulet, Anne Jausions, Laure Patas d'Illiers, Renée Triolle k.a. Relegas la revuon François Bartsch kaj Brian Moon.

En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualizaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj. La dosiero de la numero 586 temis pri *Un vent nouveau chez UEA ?*. La numero 587 enketis pri *Humour et Espéranto* kaj la numero 588 pritraktis *L'espéranto dans les écoles*.

Raportas Claude Nourmont

1.4. Esperanto Aktiv'

De 2010, UFE kaj JEFO kune dissendas retleteron al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO). Tiu letero, verkita en la franca lingvo, publikiĝas ĉiumonate.

La nuna formulo de la letero Esperanto-Aktiv' entenas kvar rubrikojn:

- *Découvertes* (Malkovroj) prezentas subjekton rilate al la esperanta movo, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de variaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj (Axel Rousseau, Raymonde Coquisart, Sylvain Barrier) verkis en tiu rubriko.
- *Ils l'ont fait dans leur région* (Lokaj faritaĵoj) listigas agadojn de la lokaj kluboj dum la pasinta monato; tiun rubrikon prizorgas Jeanne-Marie Cash do, post ĉiu evento, vi bonvenas sendi al ŝi fotojn kaj artikolon priskribante la okazaĵojn, la etoson kaj vian sperton.
- *Calendrier* (Kalendario) vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio kaj ankaŭ tra la tuta mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgas François Bartsch, do bonvolu anonci ĉiujn lokajn, naciajn aŭ tutmondajn eventojn.
- *Lu, vu, écouté ce mois-ci* (Legita, spektita, aŭskultita) prezentas ĉu libron, ĉu muzikalbumon, ĉu filmon, freŝe publikigitan aŭ pli malnovan; pluraj homoj (Anne Jausions, Axel Rousseau, Sylvain Barrier) verkis recenzon en tiu rubriko.

Pluraj personoj ariĝas ĉirkaŭ Anne-Emilie Ravache ĝis junio 2014 kaj, de tiam, ĉirkaŭ Sylvain Barrier. La skipo zorgas pri redaktado, enpaĝigo kaj publikigo, helpe de Emmanuelle Richard por la teknika flanko kaj reta dissendo.

- Jeanne-Marie Cash enpaĝigas la artikolojn en PDF versio.
- Raymonde Coquisart fotokopias, enkovertigas kaj sendas paperan version al membroj, kiuj ne havas retadreson.
- Pli ol **4000 personoj** ricevas la leteron kaj Nicolas Gauffillet zorge aligas membrojn de EF al tiu dissenda listo.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn tie : <http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv> kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni irante sur la saman retejon.

Monato	Numero	Malkovro	Legita, spektita, aŭskumtita
09/14	EA 50	Lingvoj de la mondo – Ĉu vi scias?	<i>Kavaliriko de Kapriol' kaj Kiu semas venton de Maragan'</i>
07/14	EA 49	La Akademio de Esperanto laŭ Akademianoj	<i>Tramonte travale pro l' fairo de J.H. Rosny Aîné</i>
06/14	EA 48	Edukado.net, retejo por lerni kaj instrui esperanton	<i>Ilustrita frazeologio de Sabine Fiedler kaj Pavel Rak</i>
05/14	EA 47	Intervjuo de la prezidanto de JEFO	<i>La Legisto, de Bernhard Schlink</i>
04/14	EA 46	Kial ili lernis esperanton?	<i>Neniu artikolo</i>
03/14	EA 45	Doni iom da tempo por UFE	<i>Ĉu vi serĉis la perdita generacio?</i>

02/14	EA 44	30 demandoj / 30 respondoj (3a parto)	<i>La Tirano, la liutfaristo kaj la tempo</i> de Christian Grenier kaj François Schmidt
01/14	EA 43	Muzeoj kaj bibliotekoj tra la mondo	<i>Ĉu vi aŭdis ke...?</i> , de Katalin Smidéliusz
12/13	EA 42	30 demandoj / 30 respondoj (2a parto)	<i>La morto de artisto</i> , de Anna Löwenstein
11/13	EA 41	La jarfinaj renkontiĝoj	<i>BoRoKo</i> , de Serge Sire
10/13	EA 40	30 demandoj / 30 respondoj (1a parto)	<i>Espéranto</i> , de Dominique Gautier

Raportas Sylvain Barrier

1.5. Expolanges

En 2014 Espéranto-France luprenis 9m² budon kaj deĵoris 4 tagojn. Esperantistoj disdonis flugfoliojn kaj kalendaretojn.

Intervjuo de Monique Arnaud, delonga esperantisto kaj emerita profesoro pri la angla lingvo, aperis en la usona gazeto [Language Magazine](#).

2. Kapabligo

- 2.1. Instruado
- 2.2. Ekzamenoj
- 2.3. Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno
- 2.4. Afrika solidareco

2.1. Instruado

MCE Grésillon

Depost 2010 Espéranto France estas membro de la Komitato de la Kulturdomo de Esperanto (kastelo Greziljono) : ĝi estas reelektita en 2014 ĝis 2018 kaj nun reprezentata de Didier LOISON. Nia agadraporto kutime kovras periodon januaro – decembro, sed tiun ĉi mi verkis por la periodo novembro 2013 – oktobro 2014.

Dum la koncerna periodo, ni organizis niajn proprajn staĝojn: Printempas (26.04 / 03.05, 49 partoprenantoj), Someraj staĝoj (01.08 / 17.08, entute 79 p.), Aŭtune (24.10 / 02.11, 53 p.), Novjaro Festego (planata 30.12.2014 / 04.01.2015), do entute 37 noktoj kaj 1128 tranoktoj (meze 45 personoj), 3190 manĝoj. Ni daŭrigis apliki nian programon je malfermo, akceptante ne-esperantistajn luantojn (krom la jamaj esperantistaj). Okazis 14 luadoj dum entute 66 noktoj kun 19.400 € da enspezoj.

Post la konstruo de la nova ekstera helica ŝtuparo ĝis la dua etaĝo, nia prioritato estis laboroj pri sekureco kaj re-malfermo de kelkaj (mal)novaj ĉambroj. Sekvos konekto de nia rubakvo al la publika kloako kaj enterigo de elektraj kabloj.

Krom nia kutima programo, kursoj, KER-ekzamenoj, muziko, turismo, teatro, kun gastoj el diversaj landoj kaj bela etoso por familioj... ni serĉas stabilajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn staĝojn. Asocioj pri "Interŝanĝo de scioj" kun instruaj celoj povus ferii en Greziljono, kiu dume ofertas E-kurson.

Raportas Bert Schumann

Kvinpetalo (Bouresse)

La **Kulturcentro Kvinpetalo** en Bouresse (86) okazigis 7 staĝojn dum la jaro 2014. Okazis 3 lingvaj staĝoj (en februaro, julio kaj oktobro) por komencantoj, komencintoj kaj progresantoj, gvidataj de Ansofi Markov. Post ŝia februara interveno en la loka lernejo, iuj infanoj partoprenis kursojn por eklerni la lingvon dum la ferioj. Sistema informado estis farita ĉe la lokaj komercistoj kaj pluraj lokuloj venis ekgustumi la lingvon laŭ speciala aranĝo. Okazis ekzamensesio en februaro.

Denove okazis (en majo) staĝo pri altnivela tradukado, kiun gvidis vicprezidanto de la Akademio Brian Moon. Kaj Alain Favre, fungologo, botanikisto, denove promeniĝis tra naturo kaj Vikipedio en aŭgusto. Ĉu hazardo, ke dum la staĝo aperis la 200 000a artikolo en Esperanto ĉe Vikipedio?

Elstaris du novaj kaj gravaj staĝoj: en aprilo Katalin Kovats, ĉefprizorganto de edukado.net, gvidis tre viglan seminarion por trejnado de instruantoj de la lingvo. Estis granda interesiĝo, i.a. por pretiĝo al interveno en la elementaj lernejoj, sed ankaŭ ĝenerale pro diversaj pedagogiaj projektoj. Tre internacia grupo: homoj venis el ok landoj.

En junio Anne Amblès kaj Catherine Kremer, profesiaj ĉiĉeroninoj, gvidis staĝon por la gvidantoj de la ekskursoj de la monda kongreso Lille-2015. La estontaj ĉiĉeronoj entuziasme partoprenis la viglajn sesiojn de la staĝo, kun diversaj ekzercoj kaj tuja praktikado.

Philippe Cousson daŭrigas la laboron pri organizado de la biblioteko de la kulturcentro, benedikta laboro, pardonu, laboro de tuta monaĥejo!

La kulturcentro flegas bonajn kontaktojn en la vilaĝo, i.a. kun la mediateko, kie estas eta fako pri Esperanto. Kaj Kvinpetalo helpas konigi Bouresse tra la tuta mondo: la kulturcentro havis budon en la Movada Foiro kaj partoprenis la Forumon de Kulturaj Centroj dum la UK en Bonaero.

Raportas Claude Nourmont

Cours Internet

Espéranto-France mastrumas 3 Interretajn kursojn : la programo *Kurso de Esperanto*, la kurso *Gratuit d'Espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

72 volontuloj korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2013 ĝis septembro 2014, 290 lernantoj aliĝis (270 en 2012-2013) kaj 57 finlernis la elektitan kurson (67 en 2012-2013).

Ingrid Malaquin mastrumas la kurson, Axel Rousseau zorgas la teknikajn problemojn kaj Emmanuelle Richard sendas atestilon kaj ekzempleron de *Le Monde de l'Espéranto* al la lernantoj kiuj finis la kurson.

Raportas Axel Rousseau

2.2. Ekzamenoj

La 17an de majo 2014 okazis la Tria Tutmonda Ekzamentago laŭ la KER-sistemo. El 17 urboj en la mondo, partoprenis 3 urboj en Francioj : Arras (5a, kun 11 sukcesintoj), Limoĝo (10a, 8 sukcesintoj) kaj Parizo (11a, 7 sukcesintoj).

Vidu la tutajn statistikojn pri la KER-ekzamensesioj :

<http://www.edukado.net/ekzamenoj/ker/tutmonda/raporto/statistiko>

Pormemore, inter majo 2011 kaj aprilo 2013, Espéranto-France donis 31 subvenciojn por la KER-ekzameno je suma alteco de 682 EUR.

Rilate FEI : ĝis nun ankoraŭ malsukcesaj provoj agnoskigi la KER-diplomojn enkadre de la postulitaj atestoj pri B2-nivelo por la homoj kiuj sukcese trapasis CAPES-on aŭ agregacion (aŭ la konkurson por "Professeur des écoles") : unua, malfavora, respondo de funkciulo el la ministerio, en aŭgusto 2014 (kiu jam ne plu estas en la "organigramme").

Raportas Aleks Kadar (pri KER-ekzamenoj) kaj Christian Lavarenne (pri FEI)

2.3. Petskribo Esperanto ĉe la abiturienta ekzameno

La inter-asocia laborgrupo pretiĝis dosieron prepare al la rendevuo kun la franca ministerio pri edukado.

Espéranto-France a remis vendredj 21 mars 2014 une pétition de 34 000 signataires, personnalités et élus politiques, pour demander au ministère de l'Éducation nationale l'inscription au bac de l'espéranto au même titre que les 60 langues optionnelles existantes. Vidu la foton ĉe : <http://esperanto-france.org/l-espéranto-au-bac>

2.4. Afrika Solidareco

Grâce aux dons des adhérents, Espéranto-France a envoyé des livres ou du matériel d'apprentissage et info dans les pays suivants :

D R KONGO (Sud-Kivu)

Klubo de la Paco kaj Frateco (Klupaf) (Resp. Fikiri BARUANI)

10 *Metodo 11* + 5 kasedoj + 10 *Poŝvortaroj* + 1 *Dictionnaire pratique*, + 10 skribiloj envoyés le 27/11/2013 (valeur : 156,44 €). Confirmé le 12/05/2014.

BÉNIN

ACM Bénin, (Resp. HOUNSOUNOU Francois)

10 *Metodo 11* + 10 *Poŝvortaroj* + 10 kasedoj + 10 skribiloj. Envoyé le 21/11 (valeur : 137,76 €). Réception confirmée le 28/01/2014

TUNISIE le 21/01/2014

Esperanto-Klubo en Tunis, Dorota Parzyszek,

Metodo 11, Nouveau Cours (R.Triolle), *Poŝvortaro*, *Dictionnaire pratique* + Livres de lecture : *Verda Koro*, *Katrina malfruas*, *La Krimo de Katrina*, *Vojaĝo kun Katrina*, *Faktoj kaj Fantazioj*. Valeur : 97,08 €.

BURUNDI

Hassan NTAHONSIGAYE/ Bibliothèque de RUMONGE (Selon la campagne menée par *Esperanto en Evoluo*, association régie par Johan DERKS et Stano BELOV).

Livres collectés au Congrès de Chambéry, envoyés au Burundi par Pierre Grollemund. Un colis de 4,6 kg envoyé le 20/06/2014 : Réception confirmée le 14/07. Deux autres colis envoyés par Pierre en décembre 2014. Frais d'envoi : 24,69 €.

BURUNDI

Hassano NTAHONSIGAYE (secrétaire de ANEB)

Subvention demandée pour l'édition d'un manuel d'espéranto en swahili (63 pages). Esp-France a envoyé 200€ à UEA pour subventionner l'édition (100 ex.) le 14/07/2014. Un ex. du manuel édité a été envoyé à Esperanto France par Marion Quenut.

BÉNIN

Latifou Gbadamassi : Envoyé 2 kilos de matériel d'information (Marque-pages et autocollants). Frais d'envoi : 17 €. (Réception confirmée le 17/05/2014).

TOGO

Unuiĝo Togolanda por Esperanto (UTE): Agbéhou Ayaovi (Ĝen Sekr) : Envoyé le 31 juillet 2014, 10 *Metodo 11* et 10 *Metodo 12*, 300 ex. du *Petit Calendrier 2015*. Valeur : ??? (Réception confirmée le 13/08).

Cinq pays (au lieu de quatre l'année précédente, ce n'est pas si mal. Mais on pourrait faire sans doute mieux).

Jeanne-Marie CASH, komisiito pri la Afrika fonduso.

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Universala Kongreso de 2015 en Lillo

3.1. Butiko

Plej bonaj vendoj dum la periodo 2013-2014

<i>Eta Princo</i>	260	2307,66
<i>Templo de l'suno</i>	131	1532,94
<i>Dictionnaire pratique</i> (E/F - F/E)	47	1053,40
<i>Grand dictionnaire français-espéranto</i>	27	752,55
gobelet réutilisable « Espéranto, La langue équitable »	957	619,20
<i>Cours rationnel d'espéranto</i> (éd. 2006)	56	540,00
<i>PIV (Plena Ilustrita Vortaro)</i> (eld. 2005)	8	474,00
<i>Metodo 11</i> (pour commencer)	93	425,31
<i>Poŝamiko</i>	77	406,49
<i>Esperanto - filmo</i> (DVD)	19	361,30
<i>Dictionnaire de poche</i> (F/E - E/F)	78	344,40
<i>Grand dictionnaire Espéranto-français</i>	15	339,25
Dépliant <i>Espéranto LA LANGUE ÉQUITABLE</i>	4693	328,51
<i>Espéranto par la méthode directe</i>	40	292,23
<i>Mode d'emploi</i> + DVD-rom PC	82	289,75
<i>Ĉu vi aŭdis, ke...</i> (+KD) Tekstoj kaj testoj	19	280,50
<i>Junulkurso kun franca suplemento</i>	41	277,55
<i>Nouveau cours d'espéranto</i>	23	261,69
<i>Asteriks ĉe la olimpiaj ludoj</i>	17	211,25
<i>Tramonte travale pro l'Fairo</i>	7	180,01

3.2. Sidejo

La Sidejo de Esperanto France elkore dankas vin pro via atento kaj subteno dum la tuta jaro 2014.

Sekve de ricevo kaj traktado de nenombreblaj telefonalvokoj, retmesaĝoj same kiel poŝtleteroj adresitaj al la sidejo ni :

- preparis kaj sendis pli ol 700 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj
- notis pli ol 900 aliĝojn al Esperanto France kaj abonon al LME
- notis pli ol 300 aliĝojn al UEA kaj al UK 2014

- same kiel pli ol 290 abonojn al internaciaj revuoj

Ni prizorgis ankaŭ pri specifaj agadoj kaj projektoj:

- organizado de grupojaĝo al UK 2014 (Buenos Aires, Argentino)
- registrado de aliĝoj kaj mendiloj por Nacia Kongreso 2014 (Chambéry)
- daŭrigo de laboro por ordigi kaj numerigi nian arkivan trezoron, vi povas konsulti la retejon : www.arkivo.esperanto-france.org (respondeculoj Régis Fournier kaj Jean Lazert)
- kunorganizado (Federacio IDF) kaj akcepto de pluraj konferencoj, kunvenoj, renkontiĝoj.

La sidejo estas malfermata lunde, marde, merkrede je la 9a ĝis la 18a horo (post la 18a horo preskaŭ ĉiutage okazas kursoj).

Ĵaŭdo estas rezervata por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭvidintajn au pasantajn vizitantojn.

Kiel kutime pluraj eksterlandanoj vizitis la sidejon en 2014 (el Tajvano, Svedio, Hispanio, Ĉinio, Svislando)

Vi estas bonvenaj dum viaj vojaĝoj en Parizo kaj tra Parizo. Nia skipo (Liliane Bon, Hélène Le Bihan, Jean-François Mestelan, Jean-Louis Poullet, Maria Fessl, Susanna Beglaryan) plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn...

Raportas Susanna Beglaryan

3.3. La landa kongreso

La kongreso de Espéranto-France okazis en Chambéry de la 29-a de majo ĝis la 1-a de junio 2014 samtempe kiel la kongreso de Rodanalpa Federacio. Tiu kongreso estis tre bone organizita dank'al la asocio de Chambéry, Esperanto Vive, kaj la Rodanalpa Federacio. La rezulto estis brila, ĉiuj partoprenantoj bone ĝuis la ekskursojn kaj la programo estis kulture riĉa. Dum la interkona vespero, lernantoj de Chambéry prezentis teatraĵon pri *La dento de la Kato*. Temas pri granda roko ĉe monto apud la lago Bourget, kiun la partoprenantoj al la unu el la ekskursoj havis okazon vidi de pli proksime. Estis serio da intersaj prelegoj interalie pri la *Vivo kaj utilo de Akademio de Esperanto*. La vesperoj havis interesan programon, la lernantoj de muziklernejo de apuda vilaĝo La Motte-Servolet bele kantis la Esperanto himnon. Ni ankaŭ malkovris elstaran artiston el Aŭstrio, Attila Schimmer kiu kantis en Esperanto, en la hun gara kaj en la franca. La komitato de Esperanto France dufoje kunvenis kaj ankaŭ elektis novan estraron. Partoprenis la kongreson pli ol 120 homoj. Ni dankas la tutan skipon kiu tiel bone organizi ĝin.

Raportado pri la kongreso aperis en [LME](#) kaj en kelkaj amaskomunikiloj. Aparte menciindas:

- [intervjuo](#) ĉe la regiona novaĵelsendo de la publika televidkanalo *France 3* kun la prezidanto de Espéranto-France, Axel Rousseau,
- intervjuo ĉe regiona radio kun la prezidanto de la regiona federacio Philippe Pellicier
- larĝaj [artikoloj](#) el la regiona taggazeto *Le Dauphiné Libéré* komence (5 titoloj) kaj fine de la kongreso (3 titoloj sur plena paĝo)

Raportas Raymonde Coquisart, kun aldonoj de Didier Loison

3.4. Universala Kongreso de 2015 en Lillo

UEA elektis Lillon por tie organizi la 100an UK. Loka Kongresa Komitato (LKK) estiĝis okaze de unua kunsido la 8an de decembro 2013 en Parizo. Ĝi konsistas el prezidanto Xavier Dewidehem, ĝenerala sekretariino Julia Hédoux, 11 fakaj komisiitoj kaj pluraj vickomisiitoj. Laŭ decido de la Komitato de UFE... Ĝi rekunsidis en Lillo la 12an de aprilo 2014 kun Clay Magalhães, konstanta kongresa sekretario de UEA. Pluraj LKK-anoj partoprenis en la 99a UK en Bonaero (Argentino) por prezenti la Lilla UK-n; tie la estraro de UEA kunsidis kun Xavier Dewidehem kaj nomumis Barbara Pietrzak kiel estraraninon de UEA pri la 100a UK. LKK eklaboris pri spektakloj, ekskursoj, kultura programo, komunikado, akceptado... Ĝi renkontis plurfoje la urbodomojn de Lillo kaj Bulonjo-ĉe-Mar, la turismajn oficejojn kaj diversajn partnerojn. LKK komunikis per sia retejo (www.lille2015.fr) kaj sia Facebook-paĝo.

Raportas Xavier Dewidehem

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilato kun UEA
- 4.2. Rilato kun SAT-Amikaro
- 4.3. Statuto kaj interna regularo
- 4.4. Komitato kaj membraro
- 4.5. Financo

4.1. Rilato kun UEA

Claude Nourmont reprezentas UFE ĉe la komitato de UEA. Ŝi partoprenis ties kunsidojn dum la Universala Kongreso 2014 en Bonaero. Pluraj Francoj deĵoris por informi pri la UK Lillo 2015. Xavier Dewidehem, kiel prezidanto de LKK, oficiale invitis al la jubilea UK kaj transprenis la kongresan flagon.

Kiel ĉefdelegito de UEA por Francio daŭre rolas Renée Triolle.

UFE havas regulajn kontaktojn kun UEA. La sidejo zorgas pri perado de kotizoj kaj aliaj servoj. La kontaktoj inter la du asocioj fariĝis aparte intensaj en la nuna jaro pro la preparoj de Lillo 2015.

Raportas Claude Nourmont

4.2. Rilato kun SAT-Amikaro

Kiel dum la pasintaj jaraj, Esperanto-France plenumis plurajn agadojn kun SAT Amikaro dum la periodo :

- Reta komuna datumbazo ;
- Petskribo por enkonduko de Esperanto en la abiturienta ekzameno (pétition « Esperanto au bac ») ;
- Komunaj vesperoj en Francilio (koncertoj, babiladoj, Café Esperanto...)

4.3. Statuto kaj interna regularo

Post modifo de la statuto far la Ĝenerala Asembleo la 9an de majo 2013, la Komitato reviziis la internan regularon en la 12a de oktobro 2014. Ĉi tiu revizio anstataŭigis la ĝistiamajn kunlaborkontraktojn kun membraj asocioj per komunaj klaŭzoj en la interna regularo de UFE; ĝi ankaŭ ĝisdatigis kaj polurigis la internan regularon.

Raportas Xavier Dewidehem

4.4. Komitato kaj membraro

Elektita en Artigues-apud-Bordoza (maje 2013), la komitato kunvenis 4 foje: majon 2013, oktobron 2013, januaron 2014, majon 2014.

Reprezentas la membrojn :		Reprezentantoj de la membraj asocioj :
- Sylvain Barrier	- Armelle Piolat	Auvergne : Jean-Pierre Boulet
- Guy Camy	- Karine Texier	Bretagne : Claude Bensimon
- Raymonde Coquisart	- Didier Janot	Centre-Ouest : /
- Julia Hédoux	- Aleks Kadar	France-Est : Edmond Ludwig
- Philippe Debrix	- Xavier Dewidehem	Île-de-France : Didier Loison
- Christian Lavarenne	- Claude Nourmont	Languedoc-Roussillon : Martine Ragonnet
- Sébastien Montagne	- Anne-Émilie Ravache	Midi-Pyrénées : /
- Axel Rousseau	- Emmanuelle Richard	Nord : Claude Longue-Épée
		Poitou-Charentes : Marie-France Conde-Rey
		Provence : Monique Arnaud
		Rhône-Alpes : Emmanuelle Paris
		Espéranto-Jeunes (JEFO) : Quentin Weber-Saban

Estraro :		FET : Frédéric Scibor FKEA : Marie-Thérèse Marin GEE : Michel Dechy
Prezidanto:	Axel Rousseau	
Vicprezidanto (UK):	Xavier Dewidehem	
Vicprezidanto (eksteraj rilatoj):	Didier Loison	
Kasisto:	Anne-Émilie Ravache	
Vic-kasisto:	Sébastien Montagne	
Ĝenerala Sekretario:	Aleks Kadar	
Vic-sekretario:	Raymonde Coquisart	

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo

Estis 640 membroj je la fino de la periodo 2013-2014 (30a de septembro 2014), kontraŭ 544 membroj je la fino de la periodo 2012-2013, kaj 553 membroj je la fino de 2011-2012. Dank'al la novaj membriĝo-sistemoj, la nombro de membroj unue stabiligis kaj poste eĉ rekreskis. Efektive 135 homoj estas membroj per la inter-asocio kotizo.

Vidu la suban grafikon montrantan la evoluon de la membraro ekde 2009-2010.

Federacio	2010	2011	2012	2013	2014
Ekster federacio	110	95	70	55	59
Fédération Aquitaine	29	26	34	35	73
Fédération Auvergne	15	15	11	17	14
Fédération Bourgogne-Franche-Comté	23	26	25	26	22
Fédération Bretagne	31	31	29	36	31
Fédération Centre-Ouest	53	50	46	47	46
Fédération Espéranto France Est	33	26	29	28	40
Fédération Espéranto Midi Pyrénées	15	16	14	11	13
Fédération Espéranto Nord	27	28	29	30	30
Fédération Languedoc-Roussillon	18	24	21	33	36
Fédération Normandie	23	21	21	21	21
Fédération Poitou-Charente	13	14	12	10	9
Fédération Provence	46	39	38	28	37
Fédération Rhône-Alpes	62	58	49	54	80
Fédération Île-de-France	141	125	116	114	129
Totalo	639	594	544	545	640

Nun (je 11a de marto 2015), estas 96 membroj 2014-2015, kiuj ne estis membroj antaŭe.

El la membroj 2013-2014 de Espéranto-France, 277 estis membroj ankaŭ de UEA.

Estas 47 dumvivaj membroj. Forpasis 13 dumvivaj membroj.

La averaĝa aĝo de la membroj estas 64 jaroj.

La averaĝa aĝo de la vizitantoj de la persona spaco (en la retejo) : 56 jaroj.

La averaĝa aĝo de la Komitatoj estas : 51 jaroj.

La averaĝa aĝo de la Estraranoj estas : 39 jaroj.

Averaĝa aĝo de la :	Membroj	Vizitantoj de la persona spaco (en la retejo)	Komitatoj	Estraranoj
	64	56	51	39

5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

5.1. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Membraro

En la federacio estas 71 esperantistoj (esperantoparolantoj kaj lernantoj). Bedaŭrinde, ne ĉiuj kotizas al esperanto-asocioj, ĉar kelkaj kursoj okazas en aliaj asocioj : EXEDRA (Montluçon -03), Université Populaire et Citoyenne, (Clermont-Ferrand -63), Espace Culture (MOZAC -63).

En Puy-de-Dôme estas 43 membroj, en Allier: 23, en Haute-Loire: 4 kaj en Cantal: 1.

Membrokunveno

La membrokunveno de la federacio okazis la 15-an de decembro 2013 en Asocia Domo de Mozac apud Riom. Ĉeestis 26 membroj. Kiel kutime, post la ĝenerala asembleo la ĉeestantoj festis la nakiĝtagon de L.L.Zamenhof. Al la ĝenerala asembleo venis ĵurnalisto kaj aperigis artikolon kun foto en la regiona ĵurnalo *La Montagne*.

Reprezentanto de federacio

La reprezentato de la federacio ĉe UFE-Komitato estas Jean-Pierre BOULET (anstataŭanto : Eugène PAPCIAK).

Raportas Eugène Papciak

5.2. Fédération Espéranto-Bretagne

Nia federacio enhavas 19 lokajn grupojn :

- **Côtes-d'Armor** : La asocio Armor-Espéranto enhavas la grupojn de Saint-Brieuc, Saint-Quay-Perros, Lannion, Trédez-Locquémeau, Guingamp, Dinan et Plélan-le-Petit ; aldoniĝas Plouézec
- **Finistère** : Quimper, Landerneau.
- **Ille-et-Vilaine** : Rennes, Saint-Malo, Montfort
- **Morbihan** : Vannes, Lauzach, Sarzeau, Hennebont, Pontivy, Lorient.

Membroj 2013

266 kotizoj el kiuj 237 per lokaj grupoj kaj 29 sendependaj. Aldoniĝas 13 junaj lernantoj, kiuj ne pagas kotizon.

Instruado 2013-2014

- 173 lernantoj en 12 lokaj asocioj
- 4 sabatoj staĝoj en Vannes (ĉirkaŭ 80 pers.) kaj somera semajno en Plouézec (cento da pers.)
- fulmkursoj en diversaj forumoj

Agadoj de la Federacio

- Eldono de la bulteno 2 foje/j *La Verda Triskelo*
- Organizado de rondvojaĝoj de eksterlandanoj
- 24/03-18/04/2014: prelegoj de Mireille Grosjean pri edukado al la paco en 12 lokoj, kun ekspozicio pri la rolo de Esperanto dum la unua mondmilito
- 6/7-09-2014 Budo en fama foiro Biozone en Mur-de-Bretagne (22)

Kadre de rondvojaĝo organizita de Esperanto-France, akceptado de du Ĉininoj el Wuhan en 3 lokoj kaj de Stano Marček en Vannes

- Ĝemelaj Rilatoj kun la provinco Shandong (Ĉinio) : korespondado kun la eks-prezidanto de la Shandong-a esperanto asocio kaj kun la prezidanto de la esperanto-asocio de Zaozhuang, urbo kiu situas sude de la provinco
- Vendado de libroj kaj diskoj jam eldonitaj de la Federacio
- Konceptado kaj eldonado en du paperaj ekzempleroj kaj tri plastaj ekzempleroj de ekspozicio pri la rolo de esperanto dum la unua mondmilito, dank'al la « communauté de communes du pays de Montfort-sur-Meu »
- Prezentado laŭvoje de la rondvojaĝo de Mireille Grosjean dum la SAT kongreso en Dinan, dum la somera semajno en Plouézec, dum la tuta monato de novembro 2014 en la biblioteko de Pleumeleuc (Ille-et-Vilaine) kaj en la urbodomo de Pordic (Côtes-d'Armor). Pruntedono de unu ekzemplero al Normandia asocio.
- Administrado de nia retejo <http://bretonio.esperanto-france.org> kaj de nia diskutlisto bretonio@yahoogroupes.fr
- Organizado de la ĝenerala kunveno 13/04/2014

Agadoj de la aliĝintaj asocioj

Kursoj, staĝoj, ekzamenoj, renkontiĝoj, forumoj... Jen kelkaj ekzemploj de la plej notindaj aktivaĵoj:

Côtes d'Armor

Saint-Brieuc :

- Akceptado kaj prelego de paro de Taĝikistanoj ĉe RESIA, reto de solidarecaj asocioj
- Kunlaborado kun RESIA kaj MJC
- Konversacia Ateliero en kafejo

Lannion :

- « Oficiala » kurso en la inĝenier-altlernejo ENSSAT

Dinan :

- Organizado de la SAT kongreso (09/16-08-2014)
- Kursoj en Foyer du Jeune Travailleur

Guingamp :

- Iniciado al Eo en internacia Centro Le Palacret

Plouézec :

- 18-20an de aprilo : partopreno de pluraj pluezekanoj en la kelta esperanto kongreso en Skotlando
- 16-23/08/2014 okazis la 18aj internaciaj renkontiĝoj : (cento da personoj)
Jen la raporto de la loka asocio :

Les 18^{es} Rencontres ont réuni, pendant une semaine au mois d'août, une centaine de personnes (dont une dizaine d'enfants et d'adolescents) de 10 à 94 ans, animées du désir d'échanger en espéranto.

Une dizaine de pays étrangers étaient représentés : la Turquie, pays à l'honneur cette année, la Corée, l'Ukraine, la Russie, la Slovénie, la Serbie, la Belgique, les Pays-Bas, l'Espagne et l'Islande ; et bien sûr des Bretons et des Français, mais tous espérantophones car l'espéranto est notre seul moyen de communication.

Ce fut une semaine bien chargée avec des cours tous les matins de 9h à 12h.

Après le repas pris en commun, l'après-midi est consacrée à la découverte de notre patrimoine local : le circuit des falaises, le moulin de Craca, l'abbaye de Beauport, le temple de Lanleff, la chapelle Saint-Jacques de Tréméven...

À 17h, toujours en espéranto, s'ouvrent les ateliers : théâtre, chant, informatique, poésie, origami, yoga, broderie bretonne et tissage.

Nos soirées sont consacrées à la détente : concert, avec cette année la venue d'un groupe folk de 4

musiciciens de la Frise, danses bretonnes, conférence, chant, théâtre. Cette année, après une visite à l'exposition sur les phares à Paimpol, une randonnée nocturne nous a conduits à Bilfot, sur le « sentier des douaniers », à la découverte de ces phares.

Notre sortie en bus, à Languieux nous a permis de découvrir les musées du « Petit Train » et de la « Briqueterie » témoins de la vie locale au début du XX^e siècle.

Les animateurs, étrangers en majorité, sont les ambassadeurs de leur pays et de leur culture. C'est ainsi que Junchjo, médecin naturopathe nous a fait découvrir la médecine qu'il pratique dans son pays, la Corée. Murrat, lors de sa conférence, nous a parlé de son pays, la Turquie, mais aussi pourquoi et comment il était venu à l'espéranto.

Les Rencontres d'espéranto, placées sous le signe de l'amitié, de la découverte et de l'échange sont possibles grâce au soutien de la municipalité et à l'aide des services techniques. Elles ont permis de faire connaître, internationalement, notre petite commune de Plouézec à travers le monde espérantiste.

Ille-et-Vilaine

Rennes

- video-ateliero de : esperantaj subtitoloj al videofilmoj, farado de desegnofilmo...
- Monata konversacio en kafejo
- 4/10/2014 partopreno kun aliaj asocioj en « marche pour la paix »

Morbihan

Vannes

- 4 « sabatoj », kun intensivaj sed ludemaj kursoj, kiu allogas lernantojn el la tuta regiono
- Ateliero "Teatro » kun teatraĵo dum la Zamenhofa festo
- Monataj atelieroj pri manfarado
- Partopreno en « Forum Social » de Séné
- « Esperanto-kafejo » en la Kafejo de la Haveno

Raportas Josette Ducloyer

5.3. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Jarraporto ne ricevita. Tamen ni proponas al vi legi raporton pri Kultura Esperanto Centro Grésillon.

5.4. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

Viglis la agado en Espéranto France-Est en 2014:

- Post la forpaso de la longjara ĉefredaktoro de *La Informilo*, Pol DENIS, transprenis la laboron André GROSSMANN. Li sukcesis reeldoni ĝin laŭ la sama ritmo de 4 numeroj jare. EFE nun ankaŭ proponas interretan version al siaj abonantoj.
- La papera PKK nun iom lamas, sed estas daŭre proponata al eventualaj interesiĝantoj.
- Tre sukcesa staĝo okazis en la elzasa ĉevogeza vilaĝo Storckensohn kun partopreno de 50-o da esperantistoj el Francio kaj Germanio. Interesegaj prelegoj de inĝeniero Hannes LARSSON. Belega distra vespero kun la juna plurlingva kantistino Mélanie PRIN.
- Same sukcesa aŭtuna staĝo organizita de BAVELO (Badenvirtembergga Esperantoligo) en Sankt-Peter (Nigra Arbaro). Ankaŭ tie kunvenis 50-o da partoprenantoj dum sunplena varma semajnfino kun belega panoramo montara. Prelegoj de Ed Borsboom (*Cent jaroj post la Granda Milito*), Pastro Eichkorn (Max Josef Metzger-Kiel la milito faris el li pac-aktiviston kaj kursoj), Edmond LUDWIG (1. La romano *Kiel akvo de l'rivero* kaj *La Unua Mondmilito*. 2. *La Unua Mondmilito kaj ties sekvoj laŭ lingva vidpunkto-Vero* kaj nacia propagando en Elzaso/Mozelo ĝis hodiaŭ.)

Dum ambaŭ renkontiĝoj eblis ĝui la vastan oferton de la riĉenhava libroservo de Espéranto France-Est estrata de Jean-Luc THIBIAS.

- EFE kaj BAVELO proponis ankaŭ la partoprenon al migrado tra la Vogezoj (Organizis Bernard REIFFSTECK el Strasburgo)
- Ĉiuj informoj haveblaj ĉe <http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr/>
- EFE havas 85 membrojn kaj 115 abonantojn

Agado de la grupoj en pluraj urboj:

Colmar

- Dua Festivalo de la lingvoj fare de la asocio EŬRO-AFRIKA-SOLIDARECO (Fernando N'KANU) Prelegoj de Jacques PINEDA, Edmond LUDWIG. Deklamado de poemoj: Roberto KUENY)

Gérardmer kaj Cornimont

- Prelegoj de Stano MARĈEK. Organizis Ginette MARTIN, kiu ankaŭ kursestras.

Mulhouse kaj Saint-Louis :

- Budoj ĉe la salono Bédéciné en Illzach kaj en la biologia fiore de Ungersheim.
- Ĉiumonata kunmanĝado kaj diskutado senkrokodila La verda fadeno en Mulhouse aŭ Saint-Louis.
- Informoj: <http://mulhouse.esperanto.free.fr/>
- Amika Tago en Mulhouse organizita de Jacques PINEDA kun partopreno de la Frajburga grupo.
- La Zamenhof-Feston organizis la bazela grupo en la trlanda regiono.
- Kurso por progresantoj en la Kulturdomo Espace 110 en Illzach
- Kurso por komencantoj en Mulhouse (Maison du Temps Libre) kaj en Maison des Citoyens du Monde

Nancy

<http://esperanto-nancy.fr>

- Partopreno de la membroj en la printempa kaj la aŭtuna staĝoj de EFE
- Partopreno en « Eŭropa Vilaĝo », en la komerca centro Saint-Sebastiano en Nancy, la 2 kaj 3 aĵn de Majo 2014. Renkonto, la 10an de Majo, en la MJC Beauregard, inter diversaj invititaj asocioj, dum la ĝenerala asembleo de la asocio C'rayons de soleil.
- Partopreno en « Récréanim », festo de la kvartalo Louvain, la 27an de septembro en la « ĝardenoj de Luksemburgo » en Vandoeuvre.
- Partopreno en la festo « Les Tronches en fête » la 29an de junio, en Saint-Étienne-les-Remiremont.
- Partopreno en la festo « Festi la Vida » en Raon-aux-Bois (Vogezoj), la 28an de septembro 2014.
- Kunveno ĉiun merkredon.
- Artikoloj en loka ĵurnalo pri la verko de Catherine HELL, kiu partoprenis en la konkurso organizita de EPĈ (El Polpola Ĉinio). Ŝi gajnis du premiojn.
- Vespero Zamenhof en la restoracio Eclipse la 15an de januaro en Heillecourt.

Strasbourg

- Informoj ĉe: <http://esperantostrasbourg.free.fr/>
- Reklamagado pere de La semaine de l'espéranto por diversaj publikoj en diversaj lokoj.
- Partopreno en SMILE (Lingva kafejo) Diversaj kursoj.

Thionville

- La grupo regule akceptas eksterlandajn esperantistojn kadre de la prelegturneoj.

*Informas Bruno HENRY
Raportas Edmond Ludwig*

5.5. Fédération Paris Espéranto-Île-de-France (Francilio)

Administrado

Membraro

Membro de la federacio: 132

Nombro de lokaj asocioj kaj kluboj: 7 (Asnières (92), Boissy-sous-Saint-Yon (91), Bondy (93), Épinay (93), Esperanto-94, GAE 95, Espéranto-Val-de-Seine (77), ILO Châteaufort (78))

<https://docs.google.com/document/d/1Yt49cn2ddLysPlpAPPJ3ciPU8xkgTxD4UZEdFzbZY/edit#heading=h.qif4wnz4os20>

Komitato

Sabaton la 22an de marto okazis Eksterordinara kaj la Ordinara Ĝeneralaj Asembleoj de la Federacio, en la Domo de Asocioj de la 4a distrikto en Parizo (75).

Novaj statutoj estis akceptitaj http://esperanto-france.org/IMG/pdf/eo-paris-idf_statuts-2014.pdf

La Ĝenerala Asembleo aprobis la agad- kaj fincan raportojn 2013 kaj elektis 5 novajn membrojn de la Komitato.

Sylvain Barrier, William Dumoulin, Pascal Leclaircie, Daniel Micheneau, Emmanuelle Richard.

Posttagmeze, eta grupo de partoprenantoj vizitis la Lingvo-Muzeon Mundolingua, inaŭgurita de la urbestro de la -a distrikto en oktobro 2013. <http://www.mundolingua.org>. Fonto: <http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-46-okazis>

Jen la konsisto de la Komitato post tiu Ĝenerala Asembleo :

Michèle Abada-Simon – MAS, Didier Loison – DL, Sylvain Barrier - SB, Olivier Maury – OM, Jean Delhomme – JD, Kévin Morel-Fourrier – KMF, William Dumoulin – WD, Daniel Micheneau – DM, Didier Janot – DJ, Abdel Nouri – AN,

Aleks Kadar – AK, Jean-Louis Pouillet – JLP, Sylviane Lafargue – SL, Emmanuelle Richard – ER, Pascal Léclaircie – PL

Sekve de la aprobo de novaj statutoj, ĉiuj mandatoj finiĝas en 2015.

Dum sia [komitatkunsido](#) okazinta la 25an de marto 2014, la komitato elektis la estraron:

Prezidanto : DJ ; Kasisto : DL. JD Vic-kasisto ; Sekretario : OM. 9 ; AK Vic-sekretario ; Vic-prezidanto pri prelegturneoj kaj rilatoj kun Yves Nicolas : WD ; VP pri junulaj aktivaĵoj : KM ; Rilatoj kun Espéranto-France : DL.

Sidejo

Pluraj bonvolemluloj de nia federacio helpas ĉe la Ĉerizejo pri diversaj taskoj de Espéranto-France. Kelkaj bonvolemluloj zorgas la funkciadon de nia federacio. Aparte notindas, ke la Federacio deĵoris dum julfestoj kaj novjaro, kun manĝoj, kaj dum la aŭgustaj sabatoj. La Federacio organizis diversajn eventojn en la sidejo. Vidu en la tabelo sub 2.2.

Interna komunikado

La komunikado interne de la Federacio Esperanto Parizo-Francilio disvolviĝas grandparte per la [retlisto](#) Francilio (322 mesaĝoj dum 2014) kaj la retejo <http://francilio.org/>

Granda novaĵo tiurilate: nia Federacio estis inter la unuaj organizaĵoj, kiuj sukcesis akiri la tutnovan domajn-nomon **.paris**. La nova, mallonga kaj okulfrapa, retadreso : esperanto.paris aŭtomate plusendas al francilio.org

Agadoj

Forumoj de asocioj kaj malfermaj pordoj

En septembro, en multaj urboj okazas forumo de asocioj. Ni partoprenis en : Parizo 4a distrikto, Asnières, Épinay-sur-Seine kaj Vaux-le-Pénil.

13an de septembro 2014 en Parizo deĵoris Didier Loison kaj Laure Patas d'Illiers. DL preparis kvizon por la vizitantoj, kun premioj gajneblaj. La kvizo estis anoncita en la foruma programo, kio reliefigis la partoprenon de nia asocio. Kalendaretoj estis donitaj inter alie al la urbestro de Parizo kaj al la urbestro de la 4a distrikto. Pli da informoj en la [retejo de la Federacio](#) kaj en *Le Monde de l'Espéranto* n° 589. *Fonto: Esperanto Aktiv.*

Kiel pasintan jaron, okaze de la eŭropa tago de lingvoj, ni organizis Malfermajn Pordojn de nia federacio la lastan semajnfino de septembro.

Prelegturneoj, Esperanto-kafejo kaj aliaj agadoj

Ĉi-sekva tabelo listigas (nekomplete) kelkajn el la eventoj organizitaj dum la jaro 2014 de la Federacio kaj de regionaj aktivuloj.

Monato	Tago	Evento
Januaro	mardo 14a	Epifanio-vespero, en la sidejo
	dimanĉo 19a	Visite-brunch en espéranto au Théâtre Brétigny, scène conventionnée du Val d'Orge. Découvrez l'envers du décor, les coulisses et la machinerie du Théâtre
Februaro	05-08	Partopreno al la lingva foiro Expolangues Pli ol 10 franciliaj kaj aliregionaj esperantistoj deĵoris dum la 4 tagoj en la budo de Esperanto-France : disdonis pli ol 3000 kalendaretoj kaj 800 faldfolioj, prezentis la lingvon per kursetoj en la budo po 4 fojojn tage. http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-44-okazis
	Ĵaŭdo 13	Café espéranto – au bar La folie en tête, dans la rue de la Butte aux Cailles (13e). http://cafe-esperanto.blogspot.fr/2014/02/jeudi-13-fevrier-nous-aurons-la-folie.html
Marto	07-09a	May-en-Multien (77) : Fin de semaine d'Espéranto-Jeunes – Seine-et-Marne. http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-45-okazis
	Lundo 10a	Esperanto-budo dum la "Lingvotago" en la universitato de Cergy organizita de Kevin Morel-Fourrier
	Vendredo 14a	Paris-La Défense (92) : Premier midi espéranto à la Défense une demi-douzaine d'espérantophones ont déjeuné sur le pouce et échangé (...)
	Mardo 18a	Prelego de Firdaus Shukurov pri Taĝikio http://esperanto-france.org/tournee-de-firdaus-shukurov-en-mars-2014
	Samedio 22a	Paris (75) : Assemblées générales de la fédération Vidu supre.
	Dimanĉo 23a	Prelego de Mireille Grosjean pri "espéranto et Afrique" en la franca http://francilio.org/Espéranto-et-Afrique?lang=fr
	Sabato 29a	Dua prelego de Firdaus Shukurov pri Taĝikio

Majo	Ĵaŭdo 01a	Paris (75) : Manif de E.D.E. – 1er mai http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-47-okazis
	Ĵaŭdo 01a	Paris (75) : Conférence de Miguel Angel (Cuba) http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-48-okazis
	Vendredo 09	Paris (75) : Cercle de discussion sur l'Ukraine avec Mikaelo Lineckij – Siège de SAT-Amikaro, première conférence de la tourné en France de Mikaelo.
	Sabato 21a	Muzik-festo antaŭ la sidejo de SAT-Amikaro kun Efemera Bando kaj Platano http://cafe-esperanto.blogspot.fr/2014/06/samedi-21-juin-fete-de-la-musique.html
Julio	05a	Paris (75) : Conférence de Dennis Keefe (États-Unis) – sur l' andragogie http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-49-okazis
	Sabato 26a	Prelego de Manuel Ortega (el Venezuelo) pri Eŭropo de la kundivido http://francilio.org/Esplorvojxo-Euxropo-kundivido?lang=eo http://cafe-esperanto.blogspot.fr/2014/07/esplorvojago-al-la-europo-de-la.html
Septembro	03a	Paris (75) Concert de Martin Wiese – « Café espéranto Paris », à Malakoff. http://cafe-esperanto.blogspot.fr/2014/08/concert-en-esperanto-martin-wiese-de.html
	13a	La Courneuve (93) : Stand à la Fête de l'Huma L'espéranto y était représenté cette année, contrairement à l'année passée. Grâce à la Fédération 76 du Parti Communiste, nous avons pu tenir un petit stand devant leur grande tente, de 13h à 20h. Une dizaine de personnes ont contribué en apportant du matériel de SAT-Amikaro et d'Espéranto-France. Quelques contacts ont été collectés, un millier de calendriers distribués, plusieurs espérantophones rencontrés. http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-51-okazis
Oktobro	Sabato 11-a	Paris (75) : L'espéranto à la Fête des Savoirs - Paris 9e à initiative d'Élisabeth Barbay, grâce à la participation d'Éric Eliard, W. Dumoulin, Daniel Micheneau, Hélène Marlin et Joseph Chirimwami, la table espéranto du Polyglot-club était une des plus actives (...). http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-52-okazis
	Vendredo 17-a	Paris (75) : Un Australien au Cercle de discussion - siège de SAT-Amikaro Richard Delamore, qui a fondé la télé sur Internet, Esperanto TV (...) http://cafe-esperanto.blogspot.fr/2014/10/vendredon-17an102014-babilrondo-kun.html
	Sabato 18a	Tenue d'un stand au Forum des Langues du Monde de Sénart
Novembro	7a de novembro – 19a de decembro	Vaux-le-Pénil (77) : Séances hebdomadaires à l'école maternelle Romain Rolland kadre de la "Temps d'Aménagements Périscolaires" (TAP), une fois par semaine et sur un cycle de six semaines. Ce sont Françoise Diakhate et Madeleine Crépatte qui s'occupent de cet éveil à une autre langue par les sons, à travers des jeux et chants, et basé sur un message de paix. (...) http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-53-okazis
Decembro	Vendredo 12a	Prelego de Thierry Saladin pri TUJ, sekvita de kuna kafejumado http://cafe-esperanto.blogspot.fr/2014/12/thierry-saladin-tuj-ven-12-dec18h30-20h.html
	14a	Paris (75) : Fête de Zamenhof interassociative Organisée par les Cheminots avec le soutien d'Espéranto Paris-Île-de-France et de SAT-Amikaro, la fête a eu lieu dans une salle du comité d'entreprise SNCF, près de la Gare de Lyon. Grosse participation (plus de 60 personnes de tous âges, espérantophones ou -philes). Fête marquée par une prestation haute en couleur du chanteur JoMo, par la traditionnelle loterie à l'entracte, et

		par une chorale de l'Union Artistique et Intellectuelle des Cheminots. http://esperanto-france.org/esperanto-aktiv-54-okazis
	18a	Paris (75) : Conférence-débat au musée Mundolingua par Michèle Abada-Simon devant une dizaine de personnes, dont 6 jeunes.

Krome menciindas, ke la pariza grupo de SAT-Amikaro aranĝis babilrondon cxiuvendrede.

Instruado - Ekzamenoj

Kursoj 2013/2014

Komencantoj: Michèle Abada-Simon (lunde) ; Progresantoj: William Dumoulin (jaŭde, 6 kursanoj)

3a nivelo: ne okazis. Ekzameno-preparado.

Babilrondoj

Por progresantoj, ĉiun mardon de la 18a ĝis la 19a30, organizata de Didier Janot.

Staĝoj

Dufoje okazis semajnfinaj staĝoj por komencantoj (francilio.org/stage-esperanto), gviditaj de Michèle Abada-Simon. Okazis paroliga kurso en decembre 2014.

Ekzamenoj

Prepar-sesioj al la KER-ekzameno (17a majo 2014) estis organizitaj de Didier Janot : mardo 11a, 18a, 25a de februaro

7 homoj trapasis kaj sukcesis la KER-ekzamenon en 2014.

5.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

Klubo : Béziers (24), Montpellier (16), Nimes (16), Lozère (9)

Revuo : *Sudfrancia stelo* nur aperis 2 numeroj pro manko de personoj, artikoloj...(& mia vundo)

Retejo : neniuj zorgas pri ĝi, sed grupeto eble reprenos la zorgon

Ĝenerala asembleo : 30/03/2014

La ĉefaj aferoj dum tiu jaro 2014 estis la vizito de rusa esperantistino *KLERA*, la luda finsemajno en Villeneuve-lès-Avignon (organizata de nia Federacio & la provenca)

Ciuj grupoj akceptis ŝin dum unu semajno, en Lozère, vizitoj, renkontoj kun ĵurnalistoj, ... (cf SFS)

En Villeneuve, 44 personoj partoprenis veninte el nia Federacio & el Isère, Bouches-du-Rhône, Vaucluse, Drôme.

Raportas Martine Ragonnet

5.7. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sud-Pireneoj)

Regiona kunordigado

Membraro (klubo, individuoj) kaj evoluo... Federaciaj kunsidoj, kongresoj... Rilato kun UFE, partopreno en landaj instancoj (ekz. interfederacia konferenco)

La membraro iomete malkreskis de 121 ĝis 119 (18 el CEEA, 80 el EKC, 6 de Esperanto-Tarn kaj 15? individuaj membroj de ufe, deko da membroj estas en pluraj listoj aŭ ne loĝantoj de la regiono). Nia jarkunsido okazis la 15/12/2012 en Foix, okaze de la Zamenhof-festo. Partoprenis 10 personoj, el 4 departementoj. Kiel decidita en la

jarkunsido, la asocio ne estis reprezentata dum la 3 ufekomitatkunvenoj de 2014. Ne estis sekvoj al la laboro de Laborgrupo kiun ni starigis antaŭ 2 jaroj, cetere pri rilatoj kun Esperanto-France, tamen surbaze de la diskutoj, Marion proponas ŝanĝon de statuso por antaŭenigi la aferon kaj ke tiu propono estu diskonata al ĉiuj dum la jaro 2015 por voĉdoni ĝin en la sekva jarkunsido. En la komitato membras Jorgos Comte (09), Gilbert Darrieux(65), Marc Roger(31), Marion Quenut(31), Andreo Andrieu(12), Bernard Legeay(12), Vincent Descargues(81), Michel Metzger(81), Christophe Chazarein(31) et Francis Bidault(81). André Andrieu kaj Vincent Descargues ne plu deziras membri post la jarkunsido.

Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo... Informa materialo... Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)

Partopreno en landskalaj kampanjoj. Nia asocio havas informbultenon kaj retejon. Aperis nur unu numero (januaro) de la *Cirkulero de Midi-Pyrénées*, interna bulteno, sendita kutime rete (papere al tiuj sen retadreso). Tiu ĉi estis sendita al ĉiuj membroj, kune kun *la Krokodil'* de EKC, nia asocio pagis por la printado, EKC por la sendo. Niaj retaj paĝoj kuŝas nun en la portalo de Esperanto en Midi-Pyrénées. Estas paĝoj pri la federacio, paĝoj laŭ departamento, komunaj paĝoj kaj aparta blogo por *la Cirkulero*. En *la Cirkulero*, publikiĝis deko de artikoloj en 2013. Marion respondecas pri ĝi. La adreso estas <http://Esperanto-midipyrenees.org>

Nia **Ekspozicio de 12 paneloj**, *Diversité des Langues et Espéranto*, estas unufoje jare uzata de André Andrieu en Aveyron kaj daŭre kuŝas tie. La lokaj asocioj prizorgis standojn en diversaj manifestacioj: - Forumoj de Lingvoj kaj de asocioj en Tuluzo (10), Lavour, Ariège (pluraj), Tarbes, Najac.

Organikaj foiroj (Graulhet, Montauban, Tuluzo, Muret) – **Libro-foiroj** en Aveyron – Universitato (Toulouse) – Festival Résistances (Foix)

Enmanigigo de la papera versio de *Rapport François GRIN* al la Ministrino pri ŝtata Instruado Najat Vallaud-Belkacem (informo Jorgos). La filmo *Esperanto* de Dominique Gautier Tarn-esperanto prezentis en kinejoj en Lavour Junie kaj pli poste septembre en Graulhet por konatigi la esperantan movadon; 30 ĝis 40 homoj spektis en Lavour la filmon, 10 en Graulhet. Radioelsendoj pri esperanto okazas regule en Tuluzo, tamen ne dum kelkaj monatoj printempe. Marion ekde lastjare zorgas pri ĝi preparante la elsendojn hejme. Volontulino de CTB, Léa helpas de oktobro. Ankaŭ regule okazas elsendoj en Villeneuve-d'Aveyron pri kiuj zorgas André Andrieu.

La elsendoj de Tuluzo povas esti interrete aŭskultataj ĉe <http://canalsud.net>, kaj elŝutitaj en la portalo esperanto-midipyrenees.org, tiuj de Villeneuve ĉe <http://cfmradio.fr>. Konigi esperanton en la regiono (projekto Christophe) en la departementoj sen asocioj (kiel lastjare agoj en Montalbano kaj Kadurko) Staĝo en Kadurko La Junul-Kultur-Domo de Kadurko akceptis la proponon de Christophe animi unutagan staĝon por komencantoj por malkovrigi Esperanton en ilia lokalo, en marto 2013. Estis malgranda komunikado pri tio sed tamen estis. La nombro de aliĝintoj estis tro modesta (2 personoj) por okazigi ĝin sed post la staĝo estis interesa debato pri lingvoj interesa kun deko da personoj. La direktisto proponis replani unutagan staĝon en 2015 anoncanta ĝin en la tutjara programlibreto de la MJC. Espereble, tiu staĝo okazos en februaro 2015. Informo-stando en la organika foiro de Montalbano Biosynergie, organika foiro de Montalbano, okazis la dimanĉon 21an de septembro. Estis malpli da vizitantoj ol lastjare, en la fojro kaj ĉe nia stando. Lasis sian kontakton 2 personoj kaj informiĝis sin dudeko da personoj Repago de kostoj 14€ por manĝoj dum la organika fojro de Montalbano + kosto de la stando 24€.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj... Ekzamensesioj federaciaj aŭ klubaj, nombro da ekzamenitoj...

Kursoj regule okazas iniciate de lokaj grupoj : Tuluzo (du sessemajnaj kursoj, unu jaran kurson), Ariège ? (Mirepoix, Laroque-d'Olme, Foix, Montgaillard, Verniolle (dufoje monate). En la MJC de Onet-le-Château apud Rodez : nun 1 lernanto. Ĉu daŭre en Hautes-Pyrénées ?

En Tarno, en septembro, ĉiusemajne kurso komenciĝis en Lavour kun 8 lernantoj kaj Graulhet kun 4. Hodiaŭ ni restas nur 4-5 tre motivataj en Lavour kaj ne plu en Graulhet. Tri semajnfinaj kursoj okazis en Arrout (Ariège), organizitaj de EKC (inter 15 kaj 20 partoprenintoj). EKC ne organizis KER-ekzamenon en 2014, sed estas de nove planita tutmonda ekzameno la 30-an de majo 2014. Ĉifoje Tuluzo partoprenos (3 niveloj, B1, B2, C1 (parola kaj skriba) kaj jam estas 6 aliĝintoj.

Kulturo kaj aranĝoj

La tradicia Festo de Esperanto kunvenigis por la 2a jaro en Foix, la 15an de decembro 2013, kvindek da esperantistoj el la regiono, por prelegoj, festmanĝo, foiro de asocioj, libroservo. Koruso staĝo en La Bastide-sur-

l'Hers (Arieĵo).

En marto. La CEEA organizis sian tradician 20-an korusosemajnon, sub gvido de la bulgarino Zdravka Lepne, kun 21 partoprenantoj. Vimenplektado-staĝo, komence de novembro : 2 partoprenintoj Vizito de Andy : Estis denove juna volontulo en EKC dum 2 monatoj en majo kaj junio. Andy vojaĝis en la regiono por renkonti lokajn esperantistojn (Arieĵo, Tarno, Bayonne, Tarbo, Banhero). Turneo UFE de Miguel el Kubo, aprile en Tuluzo. Vizitoj de Lena somere en Tarno, kaj en Tuluzo de Klera, Majra, Manuel, Prof Andiraona, Martin Wiese (kiu koncertis), Pablo en Tuluzo. Vojaĝoj : Nomad'kurso en januaro-februaro 2014 kaj individuaj vojaĝoj (Ekz. Marko en Skotlando) + Partopreno al internaciaj renkontiĝoj (FESTO 2014, ...) Regulaj renkontiĝoj por praktiki la lingvon, lingva kafejo, manĝo-klaĉoj kaj babilmanĝoj en Tuluzo, en Arieĝo, en Auterivo, en Tarno.

Raportas Marion Quenut

5.8 Esperanto Norda Federacio

Regiona kunordigado

Membraro (klubo, individuoj) kaj evoluo:

Arras-Espéranto: 20

Somme-Espéranto: ?

Boulogne-Espéranto: 4

Dunkerque-Espéranto: 9

Lille-Villeneuve-Espéranto: 26

Valenciennes-Espéranto: 16

Izoluloj: 6

Entute nia federacio nombras ?? (81 sen la Somme-anoj) membrojn (103 en 2013).

Kun granda bedaŭro ni ekciis pri forpaso de tri el niaj membroj: Daniel Devis el Amieno, Charles

Lericke el Valencienco, kaj Richard Szlaski el Araso.

La klubo Espéranto 80 (Somme-Espéranto) havas novajn statutojn. Tiuj laŭleĝaj statutoj permesas al la klubo agadi laŭ komunuma formo, prezidata de 9 kunprezidantoj.

Federaciaj kunsidoj, kongresoj

Nia federacia komitato kunsidis unufoje en 2014: la 3an de Marto. Kongreso okazis la 13an de Aprilo en Villeneuve d'Ascq, kun debatoj, ĝenerala asembleo, ludoj kaj vizitoj de muzeoj.

Rilatoj kun UFE

Pluraj federaciaj membriĝas en la diversaj instancoj de UFE. Claude Longue-Épée reprezentis tie nian federacion, sed li deziras rezigni tiun postenon post la UFE-komitata kunsido de la 1-a de Februaro 2015. Michel Dechy konsentas tiam transpreni tiun postenon.

Informado kaj komunikado

Federacia gazeto, federacia retejo

Nia federacia gazeto, la *Norda Gazeto*, aperis trijfoje. La skipo efike kaj bonege kunlaboras, kun Claude Longue-Épée kiel ĉefredaktoro, Cyrille Découture kiel enpaĝiganto, Claude Longue-Épée kaj Pascal Vilain kiel korektantoj, kaj France kaj Richard Valet por presado, enkovertigo kaj sendado.

Claude tamen jam plurfoje atentigis nin pri tio ke li forlasos la postenon de ĉefredaktoro post la UK en Lillo. Malfacilas trovi anstataŭanton. Nia dulingva federacia retejo ankaŭ konsulteblas:

<http://esperanto.nord.online.fr/fr/index.htm>

Informado en diversaj medioj (foiroj, lernejoj, ktp.)

La bazaj lernejoj Anatole France, Toulouse Lautrec kaj Picasso invitis Michel DECHY, kiu proponas tri prelegojn (prezentado, matematika kurso en Esperanto, sorobano en Esperanto).

Michel Dechy ankaŭ havis kontaktojn kun profesoro de Lille III kaj povis prezenti Esperanton en la universitato.

Niaj diversaj kluboj partoprenis en Forumoj pri Asocioj (Araso, Villeneuve-d'Asq, Valencienco, en Festivaloj de lingvoj (Dunkirko), kaj aliaj kulturaj aranĝoj (*Salon du livre d'expression populaire* en Araso, *Salon des langues* en Béthune, *Café des langues* en Lens, Festivalo de la bildstrio en Lys-les-Lannoy, budo ĉe la stratbazaro en Lillo, Salono *Agora* en Amieno).

Michel Dechy plurfoje prelegis: en Saint-André, Roncq (invitite de *Nord Madame*) kaj en Douai.

Didier Touller, prezidanto de la arasa klubo estis intervjuita fare de la ĉefredaktoro de la gazeto *L'Écho du Pas-de-Calais* dum du horoj.

En Bulonjo okazis prezento de Esperanto dum kongreso de Les Sociétés Savantes.

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj, staĝoj, nombroj da lernintoj

Diversaj kursoj estas organizitaj de niaj kluboj (komence de la lerneja jaro 2014-2015) :

- En Dunkirko: dufoje monate, 3 komencantoj, 6 progresantoj
- En Valencienco: 4 komencantoj, 4 progresantoj
- En Araso: 15 partoprenantoj
- En Amieno: 2 komencantoj, 9 progresantoj, kaj grupo (4 homoj) laboranta per Esperanto (tradukado...)
- En Villeneuve d'Asq: 8 komencantoj kaj komencintoj
- En Bersée: 2 komencantoj kaj 5 progresantoj
- En Lille: 5 progresantoj en la kvartala urbodomo de Lille-Centre, 2 komencantoj kaj 3 progresantoj en la Universitato pri Libera Tempo
- En Oignies: 3 progresantoj (konversacia rondo)
- En Bulonjo: babilrondoj ĉiumerkrede

Someraj staĝoj estis organizitaj de Lille-Villeneuve-Espéranto julie kaj aŭguste. Bedaŭrinde la julia staĝo estis nuligita pro manko de partoprenantoj.

Dank'al la novaj lernejaj ritmoj (TAP aŭ NAP), Claude LongueEpée kaj Michel Dechy gvidas grupojn (grupo de 8 lernantoj en Bersée, grupoj de 8 kaj 9 lernantoj en Villeneuve-d'Ascq)

Federaciaj ekzamensesioj, nombro da ekzamenitoj

Nia federacio organizis ekzamensesion la 21an de Junio 2014 en Lillo, kun 4 kandidatoj.

KER-Eksamensesio

La 14an de Junio estis organizita en Araso ekzamensesio. Eblis trapasi kaj la skriban parton, kaj la parolan parton. Sukcese partoprenis 11 kandidatoj.

Eŭropa rendevuo en Stella-Plage

Nia federacio organizas ĉiujare **Eŭropan Rendevuon**, kaj en 2014, la 26a rendevuo okazis kvinanfojon en Stella-Plage. Ĝi estis granda sukceso dank'al la entuziasmoplenaj organizantoj, Arlette Plutniak, kaj ŝia edzo Edmond. Partoprenis 84 homoj el 4 landoj.

Katalin Kováts gvidis laborgrupon por tiuj kiuj deziras esti helpantoj dum la venonta UK en Lillo, Michel Dechy gvidis konversacian rondon pri Tinĉjo, Pascal kaj Mari-Roza Vilain gvidis atelieron pri la verkoj de Serĝo Elgo (George Lagrange) kaj Franjo Lévêque gvidis atelieron pri kantado.

Belega koncerto de Jomo okazis sabate vespere. Dimanĉe matene promenadoj kaj vizitoj estis organizitaj, kaj dimanĉe posttagmeze ni ludis (Riskon) kaj aŭskultis koruson, kaj Julia Hédoux brile parolis pri la jubilea venonta UK en Lille

Kulturo kaj aranĝoj

Ludvesperoj, distraj sabatoj, Sumoo

En Lillo estis organizitaj unufoje monate ludvesperoj en Le café citoyen kaj en la librovendejo V.O. Inter 8 kaj 12 partoprenantoj renkontiĝis kaj babilis en Esperanto pere de paroligaj ludoj (ĉefe Brin de Jasette).

10 Arasanoj partoprenas la Esperanto-Sumoon organizata de Hori Jasuo (ludo kiu instigas la partoprenantojn legi librojn en Esperanto)

Prelegoj, prelegeturneoj, renkontiĝoj, festoj, ĝemelklubaj aranĝoj

Miguel Angel Gonzalez Alfonso turneis en Francio kaj prelegis en Amieno kaj en Lillo. La amiena klubo ankaŭ bonvenigis paro el Taĝikio.

En 2014 okazis pluraj ĝemelklubaj renkontiĝoj: Esperantistoj el Valencienco, renkontis la grupon de Solre-sur-Sambre (37a jara renkontiĝo!), pluraj membroj de LVE partoprenis en la Tago de la Flandraj Ardenoj, invititaj de niaj flandraj amikoj.

La klubanoj de Dunkirko festis la Zamenhofan Feston per vespermanĝo en restoracio, aliaj federacianoj partoprenis Zamenhofajn festojn en Belgio.

Partopreno en kongresoj aŭ aranĝoj landaj, eŭropaj aŭ mondaj

Pluraj federacianoj partoprenis en la UFE kongreso en Chambéry, la SAT-kongreso en Dinant, en PSI (Printempa Semajno Internacia) kaj NR (Novjara Renkontiĝo) en Germanio, en la Universala Kongreso en Bonaero, kaj en SES (Somera Esperanto Studado en Slovakio).

Marianne Dunlop el la arasa klubo vojaĝis al Krimeo kaj tie renkontis esperantistojn.

Perspektivoj

Lillo 2015

La instancoj de UEA elektis nian urbon Lillo por organizi la 100-an jubilean UK-on. Tio estas kompreneble nia plej grava perspektivo kaj defio por la venonta jaro. Pluraj federacianoj estas LKKanoj kaj aktive preparas la kongreson. Ofte venas gastoj el aliaj regionoj por pretiĝi pri diversaj roloj dum la UK.

Redaktis Katja Boen

5.9. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes

Raporto ne venis.

5.10. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

Membraro

La Esperanto-Provenco Federacio havis 62 membrojn je la 31/12/2014.

12 grupoj en la jenaj departementoj kaj urboj :

04 : Manosque kaj Villeneuve

05 : Gap

13 : La Ciotat, La Roque d'Anthéron, Miramas, Marseille

83 : Fréjus-Saint-Raphaël, Le Beausset

84 : Avignon, Carpentras, Orange.

Plie, estas membroj de nia federacio, kiuj aniĝis en neniu loka klubo. (ekzemple, sed la listo verŝajne ne estas kompleta: en Aups, Taradeau, Draguignan, Pignans, Saint-Mandrier (Var) ; en Nice, Contes, Gillettes, Guillaumes (Alpes-Maritimes)...

Administro

Membrokunveno okazis en Aix-en-Provence, la 6an de Aprilo, en la Domo de la Naturamikoj.

Elekto de Komitatanoj : Arnaud Monique ; Cerisay Michel ; Demongeot Claudie ; Mimmersheim Franz ; Oliva Pierre ; Spanjaard Thierry ; Triolle Renée ; Vilain Pascal ; Wallez Gilles

prezidanto : Pierre Oliva

vic-prezidanto : neniu

sekretario : Monique Arnaud

help-sekretario : Claudie Demongeot

kasisto : Michel Cerisay

gazetrespondeculo : Pascal Vilain

rilatoj kun Esperanto-France : Monique Arnaud /Gilles Wallez

Informado, Komunikado

La federacio plu eldonas sian trimonatan gazeton *Espéranto-Provence*.

Unu klubo (Avinjono) eldonas propran bultenon.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj neesperantistaj aranĝoj :

- Tago de la Patrino Lingvo: laŭ iniciato de UNESKO, la 21a de Februaro estas dediĉita al la patrinaj lingvoj, la lingvo en kiu ĉiu homo strukturigas sian penson kaj malkovras la mondon.
- Virina Tago la 8an de Marto : R.Triolle faris enketon pri "aborto" en la mondo. Venis pli ol dudeko da respondoj, tre diversaj, kiujn ŝi statistikis sur granda panelo, ĉar kiel kutime Esperanto-La Ciotat havis budon . Estis bona okazo montri kiel Esperanto kontribuas al trovo de informoj el aliaj mondopartoj kaj kiel Esperanto permesas trakti nuntempajn problemojn.
- R.Triolle tradukis la mesaĝon el Hiroŝima, dissendis al virinaj asocioj kaj petis diversajn homojn (aŭ infanoj) kontribui per mesaĝo aŭ desegnaĵo.
- Fine de Februaro, EKEM-04-Esperanto prezentis en Pierrevert la lingvon Esperanto dum unu semajno pere de diversaj dokumentoj kaj afiŝoj. La 27an, la filmo *Esperanto en la mondo* estis montrita kaj sekvita de debato *Kio estas Esperanto ? Kiel ĝi funkcias ?*
- EKEM-04-Esperanto prezentis Esperanton al lernantoj de la lernejo Lycée Esclan en Manosko la 3an de Julio, okaze de renkontiĝo de Klubo de la Solidareco.
- En Gap, okaze de la **Festo de la Paco** dimanĉon la 29an de Junio en la Parko de Charance.
- En Sainte-Tulle la 28an de Junio okaze de la **Festo de la Solidareco**.
- En Embrun la 13an kaj 14an de Septembro okaze de **Foiro Généri.Foirmo de Asocioj** : pluraj kluboj starigis budon en diversaj lokoj : la 6an de Septembro en Fréjus (83) kaj en La Ciotat (13) ; la 7an de Septembro de la 10a ĝis la 17a en Marseille (13 - Parko Borely) ; la 14an de Septembro en Le Beausset (83)
- La Ciotat : dum la jaro aperas regula informo pri la klubo en la gazeto de CIQ, Maison des Associations.
- F. Noireau, kiu regule ĝisdatigas perretajn anoncetojn pri Esperanto-kursoj, forlasis nian regionon.
- En CEA – Cadarache, ekspozicio estis videbla meze de aprilo, de la 7-a ĝis la 11-a, kaj reklama flugfolio pri Esperanto aperis en la entreprena bulteno.
- En Majo okazis Eŭropaj balotoj : Monique Arnaud el Gap estis listestro por la sud-oriento, kaj tiuj balotoj estis okazo informi larĝan publikon per afiŝado en la pli multo el la vilaĝoj kaj urbetoj.

Instruado kaj ekzamenoj

La diversaj kluboj organizis regulajn dumjarajn kursojn kaj iniciatajn staĝojn en klubejoj, lernejoj.

Kursoj, instruado

- En Marseille, regula semajna kurso (konversacio) en CIRA kaj en La Domo de Asocioj.
- En La Ciotat, regula semajna kurso en CIQ-Fontsaite, je dua nivelo ĉar mankas novuloj.
- La planita intensiva staĝo en La Ciotat la 5an kaj 6an de Oktobro ne okazis pro manko de kandidatoj.
- Kursoj en Manosko la 1an kaj 3an merkredojn de la monato.
- En Aix-en-Provence, en la domo de la Naturamikoj, la 5an de Aprilo, estis tre interesa mateno : pere de peĉakuĉoj estis prezentitaj diversaj temoj : Cirila alfabeto (R.Triolle), Interkonsento pri Transatlantika Partnereco, TAFTA (T.Spanjaard), edziĝfesto en Vietnamio (R.M. Quintin).
- Sabaton 14 an de Junio : tuttaga staĝo en la Domo de la Asocioj en Manosko.
- Dum la jaro 2014 ne okazis kurso en Gap.
- En Saint-Raphaël, 7 homoj vizitis la kurson, kiu okazas lunde posttagmeze.
- En Septembro, nova kurso malfermiĝis en Draguignan, kun 4 gelernantoj. (kursgvidanto : Jean-Claude Roget)
- La klubo Fréjus-Saint-Raphaël organizis M.E.S, unusemajnan staĝon ĉe la marborbo en Les Issambres, en Marto. Partoprenis multaj eksterlandanoj.
- Kursoj en Le Beausset - Centre Saint-Exupéry : de Septembro 2014 ĝis la fino de Junio 2015, estas regula kurso sabate matene (inter la 9a kaj la 12a) - 1a kaj 2a niveloj.
- Mari-Roza kaj Pascal Vilain gvidis kurson, la 15an kaj 16an de Novembro, en la 26a Eŭropa Rendevuo de Stella-Plage, organizita de la Norfrancia Esperanto-Federacio.
- Semajnfina staĝo la 29an kaj 30 an de Novembro en Le Beausset kun 28 partoprenintoj, 3 kursniveloj

Kulturo kaj aranĝoj, kultura agado kaj prelegvojaĝoj

- Festo de la Tri Reĝoj okazis en diversaj lokoj : 83 : Esperanto-Klubo de Fréjus-Saint-Raphaël, samtempe kun ĝenerala membro-kunveno ; 83 : Le Beausset ; 13 : Espéranto - La Ciotat
- En Majo, la klubo de Fréjus-Saint-Raphaël organizis renkontiĝon por kuntagmanĝi kaj ĉefe paroligi homojn diversnivele.
- En Les Issambres (Val d'Esquières, la MES-ejo) fine de Junio okazis komuna manĝo kun la klubo Fréjus-Saint-Raphaël por festi la finon de la lerno-jaro.
- Prelegturneo de tri ĉinoj en Provenco : en La Ciotat, Le Beausset kaj en Marseille la 16an/17an de Junio.
- Okaze de la Tago de la Eŭropaj lingvoj, okazis vizito al mezgrada lernejo en Saint-Bonnet (05)
- Korea instruistino, Anna, parolis pri *Alternativa lernejo en Koreio* okaze de du publikaj prelegoj en La Ciotat kaj Marseille, kaj ŝi vizitis Le Beausset .
- Multaj federacianoj partoprenis en Esperantaj kongresoj, renkontiĝoj (francaj kaj eksterlandaj) kaj staĝoj : ses Provencanoj partoprenis en la nacia kongreso en Chambéry, unu en la U.K.-o en Argentino, unu en la itala kongreso en Fai della Paganella kun ankaŭ partopreno en AMO-seminario.
- Zamenhof-Tago en Saint-Raphaël kun trideko da partoprenantoj ; bonega artikolo en la loka gazeto *Var-Matin*.
- Zamenhof-tago ankaŭ en Avinjono, kun prelego de Patrick Lagrange pri *La nigraj truoj, ĉu nuna diablo ?*.

Biblioteko

daŭra disponigo al la klubanoj de libroj kaj gazetoj en Esperanto.

Venontaj projektoj ; eksteraj rilatoj

- Mediteranea Esperanto-Semajno, en les Issambres (83), de la 7a ĝis la 14a de Marto.
- Membrokunveno en les Issambres (83) la 8an de Marto 2015.
- Nacia Kongreso ne okazos pro organizado de la U.K. en Lillo, sed membro-kunveno okazos en Parizo la 18-a de aprilo 2015.

Raportas Monique Arnaud

5.11. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes (Rodanalpo)

L'activité principale qui a occupé notre temps et notre énergie en 2014 a été l'organisation du Congrès de Chambéry du 29/05 au 1/06. Les activités habituelles de la fédération se sont poursuivies sans modification particulière. Chacune des associations membres a poursuivi ses activités propres qui ne font pas l'objet du présent compte-rendu.

Le congrès de Chambéry

National et régional. Le contexte était un peu spécial. Nous avons prévu seulement un congrès régional dans les locaux de la « maison pour tous » dans le quartier de Bissy à Chambéry, et à Artigues lors du komitatkunsido d'Espéranto France, voyant qu'il n'y aurait pas de congrès national en 2014, nous nous sommes proposés pour organiser ce congrès. Les conditions n'étaient pas optimales, car si nous avions su à l'avance qu'il s'agirait d'un congrès national, nous aurions choisi d'autres locaux plus spacieux et plus au centre ville.

L'organisation de ce congrès a été prise en charge :

- par l'association Espéranto Vive de Chambéry ;
- par les autres associations de Savoie ;
- par le bureau fédéral en lien avec Espéranto France.

Il faut ici remercier chaleureusement Espéranto Vive, toute son équipe et sa présidente Claude Pépin ainsi que Claudette Abry la trésorière fédérale.

Le congrès s'est déroulé sur trois jours pleins, du jeudi soir au dimanche après-midi.

Le vendredi a été une journée d'excursion :

- en car autour du lac du Bourget avec visite de l'abbaye d'Hautecombe et du village de Chanaz au bord du canal de Savière ;
- en randonnée pédestre sur la montagne de l'Épine avec repas au bord du lac d'Aiguebelette ;
- à pied dans la ville de Chambéry avec visite des Charmettes, la demeure de Jean-Jacques Rousseau

Le samedi a été consacré à des ateliers et des conférences :

- Mireille Grosjean, *Esperanto lingvo de paco*
- Michele Gazzola, *Lingva justeco. Lingva politiko kaj Eŭropo*
- Brian Moon, *Vivo kaj utilo de Akademio de Esperanto*

Les soirées ont été :

- le jeudi une soirée d'accueil avec présentation de la Savoie et spectacle sur la dent du Chat avec la participation de la compagnie du Gelohan ;
- le vendredi : intervention des enfants de l'école de musique avec chant de *l'Espero* suivi d'une conférence sur la flore de Savoie par Thierry Delahaye du Parc National de la Vanoise
- le samedi spectacle musical d'Attila Schimmer

Les assemblées statutaires d'Espéranto France et de la Fédération Espéranto Rhône-Alpes se sont déroulées les samedi et dimanche matins. Des visites touristiques ont été proposées dans les principaux lieux touristiques de la ville de Chambéry. Un apéritif officiel a été offert par la municipalité de Chambéry en présence de l'adjointe au maire.

Les repas ont été pris dans la salle polyvalente la Bisseraine, préparés par un traiteur et servi par des membres des associations de Savoie. Le tout dans une ambiance très conviviale. À noter qu'une cuvée spéciale de vin de Savoie au nom du congrès de Chambéry a été proposée.

Fonctionnement fédéral et communication

Le **conseil d'administration** s'est réuni le 22 novembre 2014 à Lyon. Les représentants de chaque association ont partagé leurs réalisations et préoccupations, afin de se soutenir les uns les autres, réfléchir ensemble comment améliorer leur action.

Le **nouveau bureau** a été mis en place juste après l'AG de Chambéry : Emmanuelle PARIS a pris la trésorerie tandis que Claudette ABRY devient adjointe et Mireille BESSET demeure secrétaire mais demande à être remplacée. Philippe PELLICIER signale aussi qu'il est président depuis quelques années et qu'il commence à songer à laisser sa place. Il faut donc dès à présent préparer la succession.

Des membres du bureau proches géographiquement de Chambéry se sont réunis à trois reprises dans le premier semestre 2014 à Chambéry avec les membres de l'association Espéranto Vive pour l'organisation du congrès.

Le site Internet propose les informations de base sur l'espéranto et les associations et joue son rôle puisqu'il a permis de contacter de nouveaux membres dans quelques associations. Cependant il faut souligner la difficulté à le faire vivre par manque de remontées d'informations. Le projet d'un nouveau site à fonctionnement plus coopératif devrait voir le jour en 2015.

La liste de diffusion Rodanalpo reste un outil pratique et bien utilisé pour communiquer à l'intérieur et à l'extérieur de la Fédération.

Liste alphabétique des 11 associations cotisantes et actives en 2014 :

- Albertville Esperanto
- Bona Stelo (Romans)
- Centre Espéranto de la Région Lyonnaise (CERL)
- Espéranto 74 (basée à Annecy)
- Espéranto Bourg-en-Bresse
- Espéranto Vive (Chambéry)
- Espéranto 38 (région grenobloise)
- Espéranto Grenoble
- Nova Stelo (Valence)
- Saint-Étienne
- Tarenteza Esperanto (Moûtiers)

Le nombre d'adhérents à jour de leur cotisation pour 2014 est de 177, ce qui est un nombre stable par rapport à l'année précédente. Plusieurs associations ont opté pour le système global de cotisations d'Espéranto France : Albertville Esperanto, Esperanto Bourg-en-Bresse et Tarenteza Esperanto. D'autres sont en train de réfléchir à cette question.

Projets et actions en cours

La **participation au congrès de Lille** a été un des points discutés cette année, mais aucune intervention de la Fédération n'est envisageable. La fédération veut faciliter la participation et l'engagement du plus grand nombre dans ce congrès. Une suggestion d'organiser un stage de chant en vue d'un chœur qui chanterait dans les rues de Lille à l'occasion du congrès a été faite (stages proposés par D. REDOULEZ et FAMO). Le problème est de trouver la personne qui en prendrait la responsabilité. La fédération serait prête à faciliter l'organisation et à participer financièrement en partie au moins.

Le **projet de mallette de jeux pédagogiques** est revenu dans la discussion, mais il rencontre des difficultés à aboutir. Nous n'arrivons pas à trouver d'éditeur à la dimension du projet. Mais l'intérêt porté à cette idée est toujours rappelé dans la fédération comme à l'extérieur.

Les **interventions dans le cadre de la réforme des rythmes scolaires** ont été expérimentées par plusieurs personnes, mais pas toujours avec des retours positifs. C'est assez difficile à réaliser car il y a très peu de temps, avec des enfants qui n'ont en général pas choisi l'activité et dans des conditions assez difficiles.

À noter que des associations n'ont pas pu répondre à des demandes faute de personnes disponibles aux heures voulues.

Matériel d'exposition : La fédération prête aux associations différents matériels d'exposition.

Soutien à l'édition des calendriers d'Espéranto Jeunes.

Formation

Le rôle de la fédération est de stimuler l'organisation de stages pour élever le niveau d'espéranto. Cette année dans le cadre fédéral deux stages ont été organisés :

- une journée en janvier 2014 eu CERL avec un groupe de non débutants : le but est de stimuler en particulier ceux qui enseignent ou auraient envie d'enseigner ;
- trois jours au Rousses dans le Jura en septembre : stage convivial avec visites touristiques et périodes d'étude de la langue. La fédération a pris en charge le déficit du stage de 188,63 € invitant à l'établissement d'un budget plus rigoureux pour l'avenir.

Les associations

Les 11 associations membres de la fédération ont leur propres activités très orientées sur les cours d'espéranto, mais pas seulement. Voici quelques actions originales d'associations de la fédération. La liste n'est pas exhaustive et il faut se reporter aux comptes-rendus de chaque association.

Fréjus-Saint-Raphaël

- l'association a recruté plusieurs nouveaux membres motivés, en particulier par l'idéal de l'espéranto ; organisation par ces nouvelles recrues d'une rencontre avec des espérantistes de Turin le 13 et 14 décembre 2014 ;
- expérience d'activité autour de l'espéranto dans le cadre de la réforme des rythmes scolaires. Attention de ne pas se faire piéger par des conditions défavorables qui plombent le projet, c'est ce qui s'est un peu passé ;
- liens et actions avec le Mouvement de la paix.

Bourg-en-Bresse

- développement d'une vision alternative des domaines de la vie courante : nourriture bio, réseaux d'échanges locaux... mettre l'espéranto à sa place de langue pont ;
- présence de la coréenne Anna Shin Eun Sook qui a beaucoup dynamisé le groupe ;
- visite de Juncjo, médecin naturopathe.

Albertville espéranto

- présentation de jeux dans le cadre de la ludothèque d'Albertville.

Espéranto 38

- L'association propose des activités diversifiées avec les cours, de nombreuses participations à des rencontres à différents niveaux, la poursuite d'activités auprès d'enfants.

Saint-Étienne

- Un effort important de communication sur l'extérieur pour se faire connaître est à souligné malgré la difficulté, en utilisant de nombreux moyens : calendriers jefo, radio RCF, contacts avec des personnes en responsabilité (universités, Unis-Cités, cinémas), tracts devant les lycées, festival « curieux-voyageurs », fêtes de quartier.

Raportas Philippe Pellicier

Association Espéranto-Limousin

Espéranto-Limousin est une association régionale n'ayant pas souscrit de contrat d'association avec Espéranto-France. Néanmoins cette association a tenu à nous envoyer son rapport d'activité. Nous saluons son dynamisme.

Agado de septembro 2013 ĝis fino de 2014

- Kursoj :
 - En Limoĝo : 3 komencantoj, 3 progresantoj (el kiuj unu vietnamdevena virino kaj unu Berberdevana viro!)

- En Saint-Junien 3 lernantoj
- En Tulle : 5 lernantoj
- En Brive : 4 lernantoj
- Eldono de nia trimonata bulteno Babilemo sen Limoj.
- Prelego: Pecha Kucha en Limoĝo pri Esperanto la 20an de septembro 2013.
<http://www.pechakucha.org/cities/limoges/events/51f690a34f5c2922a4000001>
- Parta partopreno al Pedagogia staĝo farita de Katalin Kovatš printempe en Bouresse.
- Partopreno al "Café des langues" en Limoĝo : 60 ĝis 100 personoj el 9 malsimilaj lingvoj.
- Organizo de sesio de UEA Ker-Ekzameno en Limoĝo, 8 kandidatoj de B1 ĝis C1.
- Aliĝo al grupiĝo de asocio ĉirkaŭ la projekto Alternatiba por festo en septembro 2015.
- Organizo de piediradoj malfermitaj al neesperantistoj:
- En monteto de Blond por malkovri prahistoriajn kuriozaĵojn
- Sur loko, kie la rezistantoj de la antaŭa mondmilito luktis kontraŭ la okupado de Francio.
- Partopreno al sciencofesto en La Porcherie 87.
- Partopreno al ekologiaj festoj en Brive kaj Tulle.
- Gastigado de 2 iraninoj antaŭe venintaj en Greziljono kaj de la kubano Miguel.
- Zamenhoffesto kun projekcio de la filmeto *La teo kiu venigas amon*.

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Nova Estraro

Fine de septembro elektiĝis nova estraro. Ĝi konsistas el :

- Quentin Weber-Seban : Prezidanto
- Sébastien Denux : Sekretario kaj reprezentanto al UFE
- Laetitia Bert : Kasisto
- Meva Cuenot : TEJO-Komitatano A
- Aldone, Julia Hédoux estas reprezentanto de UFE ĉe JEFO. Ĉiuj estraranoj estas komitatanoj, kune kun David Hauser.

Informado kaj komunikado

Kunlabore kun UFE, JEFO daŭrigis sian sukcesan eldonadon da kalendaretoj. Tiuj kalendaretoj ankaŭ enhavas informojn pri Esperanto kaj unu bildon. Ili estas senpage disdonitaj dum grandaj kunvenoj – Fête de l'Huma, Salon des Langues, ekzemple – kaj same senpage senditaj al mendantoj. Eblas donaci monon al JEFO pro tiuj kalendaretoj - tio helpas nin daŭrigi tiun gravan iniciaton.

Aranĝoj organizitaj de JEFO

FESTO okazis de la 16 ĝis la 23 aŭgusto 2014 en Pont-de-Barret, en Drôme, apud Montélimar, ĉe skoltejo. Kunestis 80 personoj el 17 landoj (inter alie Aŭstraliano, Vjetnamanino kaj Brazilano) kaj la temo estis *Revivigli la planedon*. Estas bela rezulto, ĉefe konsiderante ke estis nova organiza teamo. La partoprenantoj plie ŝatis la renkontiĝon, kio plej gravas. Dank'al Floréal Martorell kaj Méline Desnos, la spektakloj estis ege bone organizitaj. Tiel estis pluraj koncertoj de esperantistaj artistoj (Krio de Morto, Jêle, Zhou-Mack Mafuila, Platano...) kaj de lokaj grupoj (Môrce Benin, Patric, Lou Dàvi en Dub). Ankaŭ estis Esperanto-kursoj por komencantoj.

Alia grava okazaĵo estis la organizo de Grundtvig trejnado dum 4 tagoj (vidu paragrafo pri la Grundtvig programo).

Ni multe dankas kaj gratulas Jérémie Bert kaj Céline Bernard, la organizantojn kaj helpantojn, kiuj faris el FESTO

bela evento.

En 2014 ankaŭ okazis du semajnfinajn renkontiĝojn. Delphine Ya-Chee-Chan organizis unuan semajfinon en May-en-Multien (Seine-et-Marne) komence de marto kaj Céline Bernard en majo apud la monto Ventoux.

En 2015 okazos la 100-a UK en Lille. JEFO kunlaboras kun UFE por ebligi partoprenon de junuloj en ĝi.

Eksterlandaj aranĝoj

Komitatoj denove partoprenis gravajn renkontiĝojn en 2014 : IJF en Castelsardo (Italio) en aprilo, IJS en Horány (Hungario) komence julie kaj IJK en Fortaleza fine julie. Tiu ebligas reprezentadon de JEFO ene de la movado kaj varbadon da novaj francaj membroj.

Ni ankaŭ pludaŭrigis kontrakton kun du eŭropaj junularaj organizoj por "interŝanĝi" membrojn dum renkontiĝoj : IEJ (Itala Esperantista Junularo) kaj HEJ (Hungara Esperanto-Junularo). Tiel, JEFO-anoj povis partopreni senkoste al IJF (Kévin Morel-Fourrier) kaj IJS (Jérémie Bert). Interŝanĝe, IEJ-ano (Konstanze Schönfeld) kaj HEJ-ano (Peter Szabo) povis partopreni senpage al FESTO.

Aranĝoj organizitaj de JEFO

FESTO okazis de la 16 ĝis la 23 aŭgusto 2014 en Pont-de-Barret, en Drôme, apud Montélimar, ĉe skoltejo. Kunestis 80 personoj el 17 landoj (inter alie Aŭstraliano, Vjetnamano kaj Brazilano) kaj la temo estis *Revivigli la planedon*. Estas bela rezulto, ĉefe konsiderante ke estis nova organiza teamo. La partoprenantoj plie ŝatis la renkontiĝon, kio plej gravas. Dank'al Floréal Martorell kaj Méline Desnos, la spektakloj estis ege bone organizitaj. Tiel estis pluraj koncertoj de esperantistaj artistoj (Krio de Morto, Ĵele, Zhou-Mack Mafuila, Platano...) kaj de lokaj grupoj (Môrice Benin, Patric, Lou Dàvi en Dub). Ankaŭ estis Esperanto-kursoj por komencantoj.

Alia grava okazaĵo estis la organizo de Grundtvig trejnado dum 4 tagoj (vidu paragrafo pri la Grundtvig programo).

Ni multe dankas kaj gratulas Jérémie Bert kaj Céline Bernard, la organizantojn kaj helpantojn, kiuj faris el FESTO bela evento.

En 2014 ankaŭ okazis du semajnfinajn renkontiĝojn. Delphine Ya-Chee-Chan organizis unuan semajfinon en May-en-Multien (Seine-et-Marne) komence de marto kaj Céline Bernard en majo apud la monto Ventoux.

En 2015 okazos la 100-a UK en Lille. JEFO kunlaboras kun UFE por ebligi partoprenon de junuloj en ĝi.

Eksterlandaj aranĝoj

Komitatoj denove partoprenis gravajn renkontiĝojn en 2014 : IJF en Castelsardo (Italio) en aprilo, IJS en Horány (Hungario) komence julie kaj IJK en Fortaleza fine julie. Tiu ebligas reprezentadon de JEFO ene de la movado kaj varbadon da novaj francaj membroj.

Ni ankaŭ pludaŭrigis kontrakton kun du eŭropaj junularaj organizoj por "interŝanĝi" membrojn dum renkontiĝoj : IEJ (Itala Esperantista Junularo) kaj HEJ (Hungara Esperanto-Junularo). Tiel, JEFO-anoj povis partopreni senkoste al IJF (Kévin Morel-Fourrier) kaj IJS (Jérémie Bert). Interŝanĝe, IEJ-ano (Konstanze Schönfeld) kaj HEJ-ano (Peter Szabo) povis partopreni senpage al FESTO

Grundtvig projekto

JEFO partoprenas Grundtvig projekton, kadre de la eŭropa programo pri tutviva edukado kaj trejnado, kune kun Nederlanda Esperanto-Junularo, Esperanto-Asocio de Skotlando, Federacio EDE, Pola Esperanto-Junularo kaj ARCI Esperanto. La temo estas *Volontulado kiel persona pluevoluiĝo : kiel plibonigi ?* Celas pri plispartigi kaj pliprofesiigi junajn geaktivulojn kaj per trejnado kaj per interŝanĝo de bonaj trejnadpraktikoj inter la partoprenantaj organizoj. La ĉefa celo de la projekto enkadriĝas en la agadkampoj Kapablo kaj Aktivula Trejnado, internacivele antaŭenigataj de UEA kaj TEJO. Danke al la ricevita subvencio, JEFO povas ebligi siajn membrojn senpage partopreni trejnadojn, ekzemple pri negocado, merkato aŭ financa mastrumado. JEFO inter alie prizorgis organizadon de seminario dum FESTO pri teamlaboro en spektaklorganizado (Floréal Martorell, Méline Desnos), interkultura komunikado (Kristin Tytgat) kaj projektmastrumado (Cyrille Hurstel).

Retpaĝaro kaj dissendolistoj

La retpaĝaro de JEFO estis ĝisdatigita kun multaj novaj informoj interalie pri la diversaj renkontiĝoj kaj pri nia

projektoj. Meva Cuenot kaj Benoît Soubeyran (nova membro de JEFO) freŝe proponis helpi por aldoni novajn enhavojn kaj traduki ilin esperante. Vizitu nin : <http://esperanto-jeunes.org/>.

Nia jefo-membroj dissendolisto fariĝis jefo-anoncoj. Ĝi estas malferma al ĉiuj. Ni invitis la homoj kiuj partoprenis ikurso en lastaj jaroj aliĝi al ĉi-tiu listo. Ĉirkaŭ 15 homoj aliĝis !

Plie estis kreita nova dissendolisto, jefo-membroj, por kotizaj membroj.

Pluevoluiĝo de JEFO

JEFO perdis multe da membroj – aktivajn kaj neaktivajn – en la pasintaj jaroj. Pro tio, ni decidis elpensi novan strategion por revivigi la francan junularan esperanto-movado. Laborplano estis verkita kaj publikita rete post larĝa konsultado. Tamen restas grava problemo : manko je homaj fortoj.

Ni konscias pri la multaj defioj antaŭ kiuj ni staras, sed vidas tiun jaron kiel okazo realigi la multajn eblecojn de Esperanto-aktivado. Tio jam komencis kaj plifortiĝos. En januaro 2015 jam membras 20 homoj. Ni dum la jaro daŭrigos tion reaktivadon.

Raportas Quentin Weber-Seban

6.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

De GEE venis raporto pri enketo farita pri la kursoj organizataj en lernejoj kadre de la novaj lernejaj ritmoj.

Loko : **Baza lernejo de Bersée** (59235) ; Kursanoj : 8 gekursanoj CM-2-anoj

Kursoj : 45 minutaj, ĉiujn jaŭdojn.

Kursgvidanto : Claude Longue-Épée (Kapableco) ; ĉefa lernilo: *Junulkurso*

De Renée TRIOLLE : mi mem rifuzis, kvankam mi estis kontaktita de diversaj respondeculoj en diversaj urboj. Mi rifuzis "gardi la ŝafaron" kaj pretis nur kadre de pli larĝa laboro (kun la gepatroj kaj instruistoj) pri interkulturo, edukado al paco, interlingvistiko, ks .

En **Boigny-sur-Bionne** (apud Orléans), ni iras dum unu horo ĉiusemajne en la lernejo, por TAP pri *lingvoj en Eŭropo kaj*

Kutime estas dek-kvin gelernantoj, kaj ni instruas/ludas/kantas duope. Ni iom uzas metodon *Springboard to languages*, sed fakte ni faras laŭ nia sento... Pierre Dieumegard

Mi gratulas Michel pro lia tre bona iniciato, kaj mi esperas, ke multaj respondos al li.

Samtempe mi atentigas, ke Madeleine Crépatte, kiu instruas en lernejo en **Vaux-le-Pénil** (apud Melun), kaj jam respondis, ankau anoncis sian kurson en la listo de EDUKADO.net : <http://edukado.net/kursejo?kid=26117>

Estas vere konsilinde ke ĉiu kursgvidanto tion faru, por ke ni disponu chiam pri aktuala listo.

Amike, Jeanne-Marie CASH

PS : Kvankam mi mem ne plu instruas, mi daŭre interesiĝas pri tia lerneja agado, kaj pretas helpi iel ajn.

Esperanto Val-de-Seine : Kadre de TAP ; 1 – 7-11 ĝis 19-12-2014 ; Ĉiu vendredo – 15-a ĝis 16-30, Lernejo Romain Rolland, Vaux-le-Pénil ; lasta jaro en infan lernejo (5 aĝa) ; 11 gelernantoj – en 2 grupoj ; Ni kantis, ludis pere de Esperanto, desegnis kaj koloris ; ni nek legis, nek skribis; la infanoj tute bone prononcis.

Instruistoj: Madeleine Crépatte, professeur d'anglais en lycée et collège (en retraite), espérantiste depuis 25 ans ; Françoise Diakhaté, directrice de maternelle en retraite, espérantiste depuis 3 ans.

Ĉiuj estis ege kontentaj: infanoj, instruistoj ; 2 - 9-01 ĝis lernejferioj – 7 vendredoj ; Alia lernejo: Rouchon, Vaux-le-Pénil ; Ni ankoraŭ ne scias kiom da gelernantoj ; 5 aĝa

Esperanto Bourg-en-Bresse jam intervenis 4foje kadre de TAP.

- oktobre, novembre kaj decembre 2014 ni intervenis en la lernejo Charles Péguy por 5 infanoj (CE2 kaj CM1)
- Ana/Sonĝanta, instruistino el Koreio, intervenis, helpe de Michel Fontaine por eventualaj tradukbezonoj
- ĉiun lundon de la 16a ĝis la 17a
- ŝi ne instruis sed ludis kun infanoj pere de Esperanto (ludi per alfabeto de Poŝamiko, koloroj, ciferoj, ĉefaj partoj de korpo, bestoj, fruktoj...)
- ŝi ankaŭ desegnis kaj pentrigis ilin
- ŝi trifoje kontaktiĝis kun eksterlandanoj (Japanio kaj Koreio) pere de skajpo (en esperanto kun traduko)
- ŝi invitis gepatrojn kaj instruistojn la antaŭlastan fojon por klarigi al ili kio estas Esperanto
- ŝi lasis kiel rezulton de sia laboto la panelon, kiun mi sendas ĉi-kune.

En **Villeneuve d'Ascq**, en 2 lernejoj : La Fontaine kaj Prévert, dum unu horo kaj duono ĉiusemajne, dum 10 semajnoj antaŭ Kristnasko, kun 8 kaj 9 gelernantoj. Poste la TAP okazos en aliaj lernejoj. Pere de diversaj dokumentoj jam uzitaj dum diversaj kaj kutimaj prezentadoj de Eo en diversaj lernejoj, kolegioj ... : fotokopioj, kalendaretoj, alfabetoj, bildoj, desegnoj, kanzonoj ... Michel Dechy

De Claude LABETAA : Mi komencis gvidi grupon ĉiulunde posttagmeze **en Perigozo** de septembro 2013 ĝis fine de decembro (dum entute 12 semajnoj) kun ĉirkaŭ 22 gelernantoj el la sama CM2-klaso. De januaro ĝis marto mi faris same en alia Perigoza lernejo kaj en tria de aprilo ĝis junio. La gelernantoj estis multaj sed ne volontaj (ili ne elektis esperanton) do la sukceso estis ne kompleta. Tamen la produktoj estis interesaj.

Vendrede en mia vilaĝo **Bassillac** (je 8 km apud Perigozo), de oktobro ĝis junio mi renkontis la tutan lernejon (de 3 ĝis 10 jaraĝaj) sed ĉiun klason nur trifoje. Tial mi faris ne pli ol prezento, uzante precipe ludojn kaj retajn materialojn (el Bookbox...) kaj la produktoj (kelkaj desegnoj) estis malmultaj. Mi rekomencis same en Perigozo kaj en Bassillac ekde septembro 2014. Sed en Bassillac, diskutinte kun la respondeculoj, mi nun laboras kun 7 volontuloj en informadika halo en kiu mi povas uzi la reton kaj Skajpon. Meksika amiko afable komunikas kun ni kaj mi havas projekton kun japana instruistino (malgraŭ la hordiferenco)... La volontuloj preparas bondezirkartojn, kiujn ni sendos iomete malfrue al Japanio kaj Meksiko...Vidu la paĝojn, kiujn mi kreis ĉi-jare pri niaj agadoj: <http://esperanto-gep.asso.fr/tap/2014/1> (Perigozo) kaj <http://esperanto-gep.asso.fr/tap/2014/bassillac> (Bassillac)

Tiuj paĝoj estas videblaj por la infanoj, iliaj gepatroj, la instruistoj kaj respondeculoj (kiel reklamo por esperanto!) kaj niaj eksterlandaj partneroj (en 2013-2014 el Bulgario kaj ĉi-jare el Meksiko, Japanio... kaj espereble denove el Bulgario).

De Ginette MARTIN : Mia respondo estas negativa. Mi ne instruas esperanton kadre de la "edukaj hobiaj" NAP, kvankam tio restas malgranda revo ĉe mi.

Fakte, ekde novembro, amikino petis min helpi al ŝi en tiuj edukaj hobiaj, ĉar ŝi havis, de septembro, grupon de aĉuloj, kaj ŝi tute perdis kuraĝon kaj volis rezigni. Kun mia helpo, la nova grupo, kiun ni havis de novembro ĝis decembro, estis pli eltenebla.

Tamen, eĉ se oni rajtigus min instrui esperanton, mi ne farus, ĉar ili estas sovaĝuloj, ege bruemaj kaj moviĝemaj, sen atento-kapabloj. Nia fako estas kur-ludoj, kanto kaj manlaboro.

La nova grupo, kiun ni havas de januaro, estas denove grupo de sovaĝuloj. Mi ĉiam revenas ĉe mi elĉerpita kaj bezonanta kuŝadon sur la kanapo dum unu horo por retrovi iom da fortoj. Kaj ve, mia amikino lasas la infanojn fari kion ili volas, la situacio ne estas regebla ; se mi aludas, ke ili povus silenti dum kelkaj minutoj por ne igi nin surdaj, ŝi diras, ke ili estas infanoj kaj devas amuziĝi, ke mi iom maljuniĝas kaj devas kompreni la modernajn infanojn. Ni havas iom pli trankvilan etoson, kiam iliaj manoj estas okupataj, pro tio mi ĉiam preparas man-laboron. Kun la malpli malbona grupo, mi eĉ fabrikigis marionetojn.

La pozitiva flanko: mi konstatas, ke la ĉefo kaj la deko da bonvolaj personoj, kiuj zorgas pri tiuj edukaj hobiaj, pli kaj pli amikiĝas al mi, ĉar ni estas en la sama galero. Dum la paŭzoj, mi montras la leterojn, kiujn mi ricevas en la esperanta lingvo. Mi plurfoje aludis, ke mi instruis esperanton dum naŭ jaroj en teknika lernejo kun adoleskantoj, kaj ke mi penis malpli ol kun la aktualaj seĝaraj infanoj. Mia aktuala celo estas persvadi la koleginon, kiu dungis min, ke ni ne estas monstroj, kiam ni postulas de la infanoj iom da silento kaj ordo.

Instrui esperanton al tiuj infanoj utilis al nenio, ĉar aliaj problemoj pli gravaj kaj pli urĝaj kaptas mian energion. Tamen Esperanto estas la vitamino, kiu tenas min staranta meze de tempesto. Feliĉe ke Esperanto konsolas min.

En **Voreppe** (38, Isère), ni (Annette Chadelaud, Marie Sylvie Julian kaj Isabelle Saulnier) kunlaboras kadre de TAP. 8 infanoj el CE2, CM1 kaj CM2 partoprenas semajne dum 1 horo.

Ni preparis ilustritan alfabeton kaj diversajn ilojn por ludi per kelkaj facilaj vortoj. Ni uzas kartojn, domenojn, peonojn, ĵetkubojn kaj aliajn ludojn kiujn ni mem kreis por ludi, desegni, kolorigi, mimi, diveni...

Nia celo estas ludigi infanojn pere de Esperanto ; kaj tiel semi grajnojn, montri ne nur al infanoj sed ankaŭ al gepatroj, instruistoj, kaj al la urbokonsilantaro ke Esperanto vivas. Per amuzo, instrui kelkajn simplajn kaj kutimajn vortojn : koloroj, ciferoj, adjektivoj kaj maloj, eĉ akuzativon per ludo de aĉetaĵoj kaj lotludo.

Ni disdonas kelkajn fotokopiojn kiujn ili povos montri al la gepatroj.

De septembro, ni spertis kaj plibonigis metodon kaj ludojn kun 3 sinsekvaj grupoj. Ni daŭrigos tiun agadon zorgante diversigi aktivecojn.

En accord avec la municipalité de Sarzeau, le **Club Espéranto de Rhuys** (Morbihan) va sensibiliser et initier à l'espéranto 2 groupes d'une quinzaine d'élèves de CM1-CM2 pendant la période scolaire 4. Ces séances se dérouleront les mardis, jeudis et vendredis de 14h à 14h45 et de 15h à 15h45. Elles commenceront le 24 février 2015 pour se terminer le 3 avril 2015 avec une interruption pendant la semaine du 9 au 14 mars. Dans ce cadre des

TAP, il s'agira surtout d'activités ludiques destinées à susciter l'intérêt et l'adhésion réelle des enfants à l'idée de la langue internationale afin de les inciter à s'engager plus avant dans l'étude puis la maîtrise de la langue. Selon les motivations exprimées et le niveau d'expression linguistique atteint, on pourra rechercher une école, de préférence étrangère, pour engager une correspondance en espéranto. Bien évidemment il sera fait allusion au Congrès Universel prochain comme incitation supplémentaire... La méthode utilisée fera appel à *Junulkurso* et à *Bek Unu* sans prendre toutefois de caractère scolaire marqué. Francis DESMARES, ancien professeur des écoles.

Resume : kompreneble oni konjektas ke kelkaj ne respondis al la demandoj, tamen laŭ tiu enketo kaj la diversaj reagoj, maksimume 15 gekolegoj profitis la okazon por instrui Eon pere de TAP aŭ NAP, kiuj okazas en diversaj regionoj.

Kelkaj instruas dum la tuta lernojaro al la samaj lernantoj, aliaj instruas al iu grupo nur dum 7 semajnoj inter du feriperiodoj, sed prezentas la lingvon al pli da infanoj. Plej diversaj pedagogiaj metodoj estas uzitaj, sed plej ofte ludoj, kanzonoj, desegnoj bone taŭgas ĉar la kursoj okazas fine de la tago, kiam la infanoj iomete laciĝas.

Raportas Michel Dechy

6.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

F.K.E.A. kaj daŭre rifuzas morti, kaj ankoraŭ ne sukcesos vere reviviĝi... Nova prezidanto (de novembro 2014 ĝis almenaŭ UK en Lille) : Benoît ENTE. Nova kasisto : Victor SIMONNET.

Nur okazis eta monhelpo al iu esperantisto kiu multe bezonis.

Oni zorgas pri meso aŭ ekumena diservo en UK Lille.

Projektoj : ideoj ne jam precizaj kaj do ankoraŭ ne realigeblaj.

Ĉu mirakloj baldaŭ?

Raportas Michèle Abada-Simon

6.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

Jara Raporto de FET ricevita por la periodo 2013-2014.

La ĉefa agado de FET estas la organizado de Esperanto-budo dum la Homara Festo. Ni ricevis raporton pri tio:

Bilanco homarfesto 2014

Ĉi-jare ni ne povis havi memstaran budon ĉe la homarfesto sed Esperanto tamen sukcesis esti videbla dum la sabata tago. Dank'al la kompartia federacio de la departemento 76, ni povis deĵori de la 13a ĝis la 20a antaŭ ilia budo. Deko da personoj helpis kunportante la materialon el SAT-amikara sidejo kaj Ĉerizejo kaj/aŭ deĵorante surloke, kaj ebligis vendi por 130 eŭroj da varoj, kaj kaptis kelkajn kontaktojn de eventualaj ontaj lernantoj.

FET dankis la federacion 76 per 100 eŭra ĉeko.

Por venontjare, ni ŝatus havi budon iom pli ampleksa (ĉi-foje estis nur du tabloj) kaj dum pli longa tempo. Por tion sukcesi, ni bezonas homfortojn kiuj pretos kune deĵori. Ju pli multe ni estos des pli agrable estos por ĉiuj!

Estis propono repagi la enirbileton por homoj kiuj sin anoncas por deĵori dum minimume du horoj.

Raportas Flora Markov